

EL POPOLA ĈINIO


中國報道 1979 12




GRANDIOZA SPORTKUNVENO


Lastatempe okazis en Beijing (Pekino) la Kvara Tutlanda Sportkunveno de Ĉinio. Ĝi estis la plej granda sportkunveno dum la 30 jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. En ĝi iris 34 konkursoj de pilkludo, atletiko, gimnastiko k.a. Ĉe la inaŭguro estis farita grupa gimnastiko "Nova Longmarŝo" kun 16.000 partoprenantoj.

Eniro de sportistoj







Sceno "Brila Perspektivo" el la gimnastiko



Draka danco el la gimnastiko




Lernantinoj en dancado




Finala konkurso de
virina gimnastiko

100-metra vira sprinto




Matĉo de basbalo






Sceno "Celebro de la 30-a Datreveno de la Fonda de la Popola Respubliko" el la gimnastiko




Ringa gimnastiko


Finala matĉo de futbalo



Virina altsalto



Finala konkurso de virina gimnastiko
Matĉo de flugpilko






毛主席为世界语社四十周年纪念
一九七九年十月 董其昌 画

POR MEMORIGO

Esperantisto-pentristo Dong Shouping speciale pentris florantan ruĝan umearbon, por memori la 40-an datrevenon de la manskribaĵo farita de prezidanto Mao Zedong por la Yan-an-aj esperantistoj.

Dong Shouping en pentrado



La de Dong Shouping transskribitaj vortoj faritaj de prezidanto Mao Zedong por la Yan-an-aj esperantistoj: "Mi dirus ankoraŭ la samon: Se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucionan, do Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata."

我還是這一句話：如
果在世界上沒有形成，
而載之於心的國際
主義之說，革命之革
命之說，那末，在
世界上是不存在的，是
應該學的。

毛主席的「世界語」題
詞四十年紀念

一九七九年十二月
董壽平年敬題

GEESPERANTISTOJ EN DIVERSAJ

LOKOJ DE ĈINIO



Konversacias geesperantistoj el Beijing, Shanghai, Tianjin kaj Hubei.



Britaj geesperantistoj gesinjoroj Rowe gastas en nia redakcio.

Fu Mingdi, veterana esperantisto kaj profesoro de la Hunan-a Normala Instituto, en la Ĉina Esperanta Labor-kunveno

Esperantisto kaj fama ĉina verkisto Bakin





Geesperantistoj de Suzhou



Orkestro de la Wuhan-a Esperanto-
rondo de Hubei-provinco

EL POPOLA ĈINIO

中國報道

1979
N-ro 12
(255)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN

P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Enhavo

SUR LA KOVRILO:

Grupa gimnastiko

BILDPAĜOJ:

1. KOLORA SERIO
Grandioza sportkunveno
2. NIGRA-BLANKA SERIO
(1) Por memorigo
(2) Geesperantistoj en diversaj lokoj de Ĉinio
3. KOLORA SERIO
Shaoxing
4. NIGRA-BLANKA SERIO
Insulo de birdoj
5. KOLORA SERIO
(1) Fotografiaj verkoj de esperantistoj
(2) Vintraj sportoj en Jilin
(3) Metiartaĵoj "Qiuse" kaj papertranĉaĵoj de Foshan


SUR LA DORSKOVRILO:

Vintra neĝo (ĉinstila pentraĵo)
de YU ZHIXUE

Bela perspektivo de Esperanta laboro	2
Vizito al pentristo Dong Shouping	4
ESP-NOVAĴOJ	6
Granda sportkunveno	8
Novaj steloj en la ĉina sporta rondo	12
La elektra industrio de Ĉinio	16
Iom pri la aromaja industrio de Ĉinio	20
TRA ĈINIO: La antikva urbo Shaoxing	22
De Lhasa al Xigaze	25
Metalaj Metiartaĵoj de Jiangdu	30
Vizito al la loĝkvartalo Wulaocun	32
Rakonto pri transloĝiĝo	34
Kiom da infanoj ŝi havas	36
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Revizito al Dayaoshan-monto	40
KURANTAJ AFEROJ:	44
AMIKECO: Rakonto pri okulgloboj	46
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Antikva biblioteko Tianyige	48

Bela Perspektivo de Esperanta Laboro

— Parolado ĉe la Ĉina Esperanta
Labor-kunveno



Kamarado Hujucz

Koran saluton al gekamaradoj!

Mi eklernis Esperanton en 1914, nun mi ankoraŭ povas iom paroli Esperante. Tio atestis ke Esperanto estas ne malfacile lernebla. Tiu-tempe mi lernis la anglan lingvon jam du jarojn, tamen mi ne povis bone posedi ĝin, renkontinte malfacilajojn. Poste mi aŭdis ke Esperanto estas facile lernebla kaj mi ekprovis lerni ĝin. Kaj dank' al Esperanto, mi lernis la anglan lingvon pli facile. Mi sentis, ke Esperanto estas facile lernebla, kaj povas servi kiel instrumento por la internacia kultura interkomunikiĝo. Ĉar Esperanto estas kompare scienca lingvo kun regula prononco kaj gramatiko, tial oni povas pli facile posedi ĝin. Mi povis uzi ĝin nur post kelkaj jaroj da lernado.

La ĉina Esperanto-movado havas historion kun pli ol 60 jaroj. Pro multaj obstakloj ĝi ne povis akiri grandan disvolviĝon. Ĝi estas tre zorgata de la Komunista Partio de Ĉinio. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la Partio kaj registaro alte taksas Esperanton. Prezidanto Mao, ĉefministro Zhou Enlai kaj vicĉefministro Chen Yi subtenis Esperanton. Se ne estus la gvido de la Partio, do ne estus disvolviĝo de Esperanto en Ĉinio. En multaj landoj de la mondo troviĝas esperantistoj, eble nur en Ĉinio esperantistoj povas ricevi tiel grandan helpon kaj subtenon de la Partio kaj registaro.

En la periodoj de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito, multaj revoluciaj kamaradoj lernis Esperanton en malliberejoj por legi Esperantajn legaĵojn eldonitajn de Sovetunio. Ĉar la rusa lingvo estas malfacile lernebla, kaj cetere legantoj de sovetuniaj eldonaĵoj estis facile rigardataj de Kuomintangaj reakciuloj kiel danĝeraj elementoj. Kiel vi ĉiuj scias, japana esperantistino Verda Majo subtenis nian reziston kontraŭ la japanaj agresantoj kaj propagandis per Esperanto nian nacian liberigan militon al la mondo. Post la Liberiĝo de nia lando, oni fondis la Ĉinan Esperanto-Ligon kaj eldonadas la revuon «El Popola Ĉinio». Mi opinias ke Esperanta laboro estas tre grava kaj havas belan perspektivon. Ni devas rigardi antaŭen, pli malproksimen.

Kio estas Esperanto? Koncize dire, ĝi estas internacia "komuna lingvo". Prezidanto Mao diris, ke kiam la homaro enpaŝos en la komunisman socion, interkomunikiĝo inter diversaj landoj plimultiĝos kaj eĉ ne troviĝos ŝtatoj. Tiam la homaro alfrontos la lingvan problemon. Mi opinias, ke tiam oni devos uzi la internacian komunan lingvon Esperanton. Ĝuste kiel en nia lando, la ĉina popolo parolas en sennombraj dialektoj. Nun nia lando jam estas unuigita, tamen nia komuna parollingvo ankoraŭ ne estas disvastigita. Pro tio niaj edukaj branĉoj devas daŭre disvastigi la komunan parollingvon. In-

ternacie disvastigi Esperanton estas longtempa laboro. Pasis pli ol 10 jaroj de post la lasta kunsido (la Tutlanda Esperanta Labor-kunsido en 1963 en Beijing — la Red.). Mi ankoraŭ memoras, ke kamarado Chen Yi diris, ke Esperanto povas esti disvastigata kaj devas esti disvastigata, sed tiu laboro devas esti farita pacience, kaj ne haste. Ne reala estas la opinio ke Esperanto povas tuj esti disvastigata kaj uzita en ĉiuj partoj de la mondo. Kvankam ni povas ĉiujare partopreni en la Universala Kongreso de Esperanto, tamen Esperanto ankoraŭ ne povas esti la sola lingvo en la internacia interkomunikiĝo. Sed kredeble venos la tago, en kiu la homaro enpaŝos en la komunisman socion aŭ en pacan periodon kaj Esperanto ricevos grandan disvolviĝon.


Multaj fremdaj amikoj opinias ke la ĉina lingvo estas la plej malfacile lernebla. Multaj amikoj volas viziti Ĉinion, sed ili bezonas interpretistojn. Por iuj lingvoj ni havas sufiĉe da interpretistoj, sed por iuj aliaj ne sufiĉe. Pro tio ni havas devon disvastigi Esperanton ne nur en la mondo, sed ankaŭ en nia lando. Por efektiviĝi la “kvar modernigojn”, ni devas enkonduki fremdlandajn progresajn teknikojn, pli multe

disvolvi turisman aferon en nia lando. Tial, Esperanta laboro estas necesa por nia afero.


Krom la Ĉina Esperanto-Ligo, ni starigis ankaŭ esperantistajn organizojn en diversaj lokoj kaj faris esperantajn aktivadojn. Nuntempe ni havas pli ol 1,000 esperantistojn, post 2-3 jaroj ni havos 10,000 kaj post 5-6 jaroj 50,000-60,000 esperantistojn. Tiam oni starigos Esperantan fakon en universitatoj kaj mezlernejoj por eduki junajn esperantistojn. Ni, ĉeestantoj de la kunveno, plejparte estas maljunaj kaj devas instrui Esperanton al juna generacio.

Mi esperas ke Esperanto disvolviĝos tagon post tago, malgraŭ tio, ke mi faris malmultan kontribuon por Esperanto. Prezidanto Mao diris: “Mi dirus ankoraŭ la samon: Se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internacisman kaj la ideon vere revolucion, do Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata.” La vortoj montris al ni direkton. Mi esperas ke kamaradoj daŭre klopodos, pli multe faros laboron, pli multe korespondos kun fremdaj amikoj, pli multe ĉeestos internaciajn Esperantajn kongresojn. Ĉio ĉi tio estas farenda.

Bonan sukceson al la kunveno!



*Kamarado Hujucz
surskribas en la
Ĉina Esperanta
Labor-kunveno.*



Pentristo Dong Shouping

ANTAŬ nelonge mi informiĝis de mia amiko, ke la fama ĉina pentristo sinjoro Dong Shouping estas esperantisto. Tio min interesis kaj ni kune vizitis lin.

Enirinte en la ĉambron de sinjoro Dong mi estis forte impresita de ĝia arta etoso. Sur la muroj pendis multaj kaligrafiaĵoj, pentraĵoj kaj koloraj pejzaĝo-fotoj donacitaj de liaj amikoj kaj sur la tablo kuŝis diversaj penikoj, paperpecoj grandaj kaj malgrandaj por pentrado kaj inkŝtonplatoj. Tio montris la diligentecon de la pen-

Vizito al pentristo Dong Shouping

tristo en sia kreado. En la ĉambro jam estis kelke da junaj vizitantoj vigle interparolantaj kun li. Li tute ne miris pro nia neatendita vizito kaj ekparolis kun ni varme kvazaŭ kun amikoj longe neviditaj. Kiam nia parolo tuŝis Esperanton, li rakontis al ni interesplene kiel li eklernis Esperanton.

En septembro de 1923, kiam li estis 19-jara, li sukcesis trapasi la eniran ekzamenon de la Esperanta Lernejo de Beijing. Kun la ideo ke la homaro pli aŭ malpli frue eniros en mondan komunumon kaj Esperanto estos utila ilo, li ekstudis Esperanton kaj samtempe ekonomikon. Tiam, la granda ĉina verkisto Lusin lekciadis pri "Konciza Historio pri la Ĉina Fikcio" en tiu lernejo. Multfoje li aŭskultis prelegojn de Lusin. Li diris ke sinjoro Lusin estis tre afabla kaj neniam forestis okaze de sia leciona horo. Liaj lekcioj tiel interesis la studentojn, ke ĉiufoje la klasĉambro plenplenis de aŭskultantoj. Sed la tiama militarista registaro malpermesis disvastigon de Esperanto kaj reakciaj policianoj ĉiam gvatis la lernejon. Poste la lernejo paneis kaŭze

Lia ĉinstila pentraĵo "Huangshan-monto"




de studentaj strikoj, do li iris al Tianjin por studo. De la jaro 1928 ĝis nun li tutanime okupiĝis pri pentrado kaj kaligrafio.

Dum la pli ol 50 jaroj li ne okupiĝis pri Esperanto, tamen hodiaŭ li ankoraŭ povas ĝuste legi multajn vortojn en la gazeto El Popola Ĉinio kaj memori iliajn signifojn. Li diris kun rideto, ke Esperanto vere estas lingvo kompare scienca kaj logika kaj pli facile lernebla kaj komprenebla ol la angla lingvo. Nun, ĉiam pli multiĝas interŝanĝoj de ekonomio kaj kulturo inter la diverslandaj popoloj kaj oni bezonas pli ol antaŭe komunan lingvon por interkompreniĝo kaj lernado unu de alia. Tial Esperanto estas lerninda.

Ni, en la nomo de la redakcio de El Popola Ĉinio, petis lin fari pentraĵon por memori la 40-an datrevenon de la skribo de la vortoj de prezidanto Mao Zedong pri Esperanto. Li ĝoje konsentis.

Sinjoro Dong estas ĉina nuntempa pentristo de pejzaĝoj kaj famiĝis pro siaj majstraj verkoj pri la bela Huangshan-monto. La nomita monto en la provinco Anhui en sudorienta Ĉinio estas unu el la plej famaj pitoreskejoj de nia lando. De antikveco ĝi ĉiam interesas turistojn kaj pentristojn per siaj mirindaj montpintoj, diverspozaj pinoj, klaraj fontoj kaj nubomaro. En la historio de nia lando, multaj pentristoj famiĝis pro pentrado de la monto kaj formiĝis aparta skolo. Sinjoro Dong kreis sian propran stilon kaj atingis eminentan sukceson en arto surbaze de la atingoj de la antikvuloj. Liaj pentraĵoj pri mirindaj rokoj, montpintoj, nuboj, nebuloj, pinoj kaj bambuoj estas versimilaj. La nuboj pentritaj de li riĉas je nuancoj, kaj la pinoj, bambuoj, umearboj kaj rokoj el liaj penikoj karakteriziĝas per fortikeco kaj varieco kaj rikoltis laŭdojn de la belartaj rondoj.

Inter liaj majstraj pentraĵoj estas "Loushan-pasejo", "Pino kaj Akvofalo". La unua estis pentrita en 1956 por memori la Longan Marŝon de la Ruĝa Armeo. Tiam la Ĝenerala Politika Departemento de la Ĉina Popola Liberiga Armeo komisiis al li kreadon de la pentraĵo kaj li vojaĝis laŭ la vojlinio de la Longa Marŝo en la provincoj Guizhou kaj Sichuan por kolekti materialojn de pentrado. Tiu pentraĵo bone pre-



Lia verko "Pino kaj Akvofalo" por la halo de la Internacia Klubo de Beijing

zentas la bildon priskribitan en la poemo "Lou-shan-pasejo" de prezidanto Mao. Kaj la lasta estas pentrita en 1973 por la Internacia Klubo de Beijing, laŭ la instrukcio de ĉefministro Zhou Enlai. Nun ĝi estas eksponata en la halo de la klubo. Sur la bildo estas granda akvofalo fluanta de la ĉielo malsupren kaj majesta miljara pino en la dekstra flanko kovras parton de la akvofalo, tamen oni povas vidi tra branĉoj kaj folioj la arĝentan akvofalon. Ĝi estas tiel versimila ke starante antaŭ ĝi oni kvazaŭ aŭdus bruadon de la akvofalo.

La pentristo estas nun jam 75-jara, sed ĉiutage li persistas en pentrado. Liaj novaj pentraĵoj "Printempo Venas al Tiandu-montpinto", "Belaj Montpintoj" kaj "Rigardo al Akvofalo" k. a. estas alte taksitaj de ĉinaj belartistoj. Tiuj verkoj koncentre spegulis lian grandan amon al la patrolando, ili estas artaj floroj de lia sperto akirita en la diligenta praktikado dum la tuta vivo.

Li estas eminenta ankaŭ en kaligrafio. En sia juneco li jam komencis studi ĉinan kaligrafion, sin ekzercante diligente tiel en ŝvitigaj someroj kiel en frostaj vintroj. Fine li kreis sian propran stilon en kaligrafio. Liaj kaligrafiaĵoj kun poemoj de prezidanto Mao kiel tekstoj karakteriziĝas per forteco, neteco kaj viveco.

EKSTERLANDAJ GEESPERANTISTOJ GASTIS EN BEIJING EN SEPTEMBRO

La Beijing-a septembro kun agrabla vetero kaj ĉarmaj pejzaĝoj estas ideala sezono por turismo. Pro tio en sept. alvenis multaj fremdaj turistoj al nia ĉefurbo, inter kiuj troviĝis ankaŭ geesperantistoj, nome ges-roj Bouchon kaj ges-roj Uze el Francio kaj angla s-ino Nancie Durham. Post kiam ili atingis Beijing, ili intervidiĝis kun lokaj geesperantistoj.

Vespere de la 20-a de septembro, okazis kunsido de geesperantistoj el la Ĉina Esperanto-Ligo, la redakcio de El Popola Ĉinio, Radio Pekino kaj Guozi Shudian por bonvenigi ges-rojn Rowe el Britio. En la kunsido gesinjoroj Rowe prelegis pri la

brita Esperanta movado. La vespero plenis je gaja amika atmosfero.

Antaŭ septembro, ankaŭ japana esperantistino s-ino Kida Harumi kaj aŭstralia esperantistino M. Ell-yard intervidiĝis kun Beijing-aj esperantistoj.

ISLANDA ESPERANTISTO RAGNAR FORVETURIS DE BEIJING AL JAPANIO

Islanda esperantisto s-ro Ragnar, kiu studis en Ĉinio, diplomitiĝis somere en la Beijing-a Universitato kaj forveturis en sept. al Japanio por tie daŭrigi sian studon. Antaŭ sia foriro li faris viziton al la urboj Xi'an, Chengdu, Chongqing, Wuhan, Shanghai, Suzhou kaj Tianjin, kaj ricevis varman bonvenigon de lokaj esperantistoj. Je la 10-a de septembro Beijing-aj esperantistoj okazigis tekunsidon por adiaŭi lin. Dum la ĝoja kolektiĝo, la gesamideanoj interŝanĝis amikajn vortojn kaj esprimis la deziron ke la ami-

keco inter la popoloj de Ĉinio kaj Islando disvolviĝu tagon post tago.

NOVA ASPEKTO DE LA ĈINA ESPERANTA MOVADO

En la urbo Guiyang diversspecaj personoj komencis lerni Esperanton: Esperantistoj en la urbo Guiyang de Guizhou-provinco aktive propagandis Esperanton. En la centro de la urbo ili starigis propagandan tabulon pri «El Popola Ĉinio», kiu ĉiutage altiras al si centojn da pasantoj.

De julio de la kuranta jaro, trifoje ili starigis Esperantajn kursojn, kiujn vizitis laboristoj, kamaranoj, inĝenieroj, teknikistoj, instruistoj el universitatoj kaj mezlernejoj, ŝtatoficistoj kaj soldatoj. Por faciligi la lernadon al la komencantoj ili kompilis lernolibron kaj legaĵojn kaj reprenis la Novan Vortaron Esperanta-Ĉinan en 3,000 ekzempleroj.

Novaj Esperanto-kursoj de la Wuhan-a Esperanto-Rondo: Je la 9-a de septembro, ĉijare, kamaradoj de la Wuhan-a Esperanto-Rondo de Hubei-provinco refoje fondis ses Esperanto-kursojn kun 250 lernantoj, inter kiuj estis laborantoj el ĵurnala redakcio, radiostacio, televida stacio, turisma servo, poŝtoŝtelo, biblioteko, kultura kaj eduka buroo kaj artaj grupoj. Malnova esperantisto Xue Chengzhi (Seĉencz), profesoro de la Centra-Ĉinia Pedagogia Instituto, ĉeestis la inaŭguron de la kursoj kaj kuraĝigis la lernantojn, ke ili bone lernu Esperanton por servi al la kvar modernigoj de la patrolando. La lokaj ĵurnalo kaj radiostacio raportis pri tiuj kursoj.

Ankaŭ la Wuhan-a Universitato fondis postlaboran Esperantan kurson, kiun vizitas ĉ. 100 studentoj, instruistoj kaj oficistoj de la universitato.

La Wuhan-a Esperanto-Rondo



Ĝojiga novaĵo el la karbourbo Huainan: En la urbo Huainan de Anhui-provinco, fama pro sia riĉeco je karbo, starigis, en junio ĉijare, Esperanta grupo kun 15 membroj. Ili aktive propagandas Esperanton inter laboristoj kaj eldonis multobligitan gazeton «Voĉoj el la Karbourbo». En la gazeto troviĝas ne nur artikoloj pri Esperanto, sed ankaŭ mallongaj legaĵoj por komentantoj. Por kulturi Esperantajn kadrojn ili starigis Esperantan kurson.

Chongqing-a Esperanta Grupo starigis Esperantan kurson por laboristoj: Je la 18-a de septembro, la sindikato de la centra kvartalo de la urbo Chongqing starigis du postlaborajn Esperantajn kursojn, kiujn vizitis 90 laboristoj kaj sindikataj laborantoj. Ilia lernado daŭros duonjaron. Esperantistoj de la Chongqing-a Esperanta Grupo prenis sur sin la taskon de instruado.

Esperantaj kursoj en Taiyuan, Changshu kaj aliaj lokoj: Antaŭ nelonge iu mezlerneja instruisto en la urbo Taiyuan de Shanxi (Ŝanxi)-provinco iniciatis postlaboran Es-

perantan kurson en la Kvara Konstrua Kompanio de la provinco. Ĝin vizitas pli ol 50 personoj.

Esperantisto laboranta en la poŝtoŭficejo de la gubernio Changshu en Jiangsu-provinco starigis Esperantan kurson en la gubernia urbo kaj eldonis multobligitan Esperantan gazeton «Verda Lampiro».

RADIO PEKINO ĈIUTAGE DISAŬDIGAS EN ESPERANTO

Ekde la 30-a de oktobro, ĉijare, Radio Pekino ĉiutage havas disaŭdigon en Esperanto.

Ekde decembro de 1964, Radio Pekino komencis disaŭdigi en Esperanto. En la lastaj 15 jaroj, ĝi konigis per Esperanto la pasintecon kaj estantecon de Ĉinio al diverslandaj esperantistoj, fortigis amikecon, propagandis Esperanton kaj ricevis laŭdon de aŭskultantoj. Multaj el la aŭskultantoj skribis al ĝi leterojn petantajn plimultigi disaŭdigon en Esperanto.

Por kontentigi la peton de aŭskultantoj kaj pli bone raportoj pri la konstruado de la kvar modernigoj de Ĉinio, pri la historio, geografio,



Parto de la membroj de la Huainan-a Esperanto-Grupo


kulturo, arto kaj vivo de la diversnaciecaj popolanoj de Ĉinio, pri la ĉina kaj alilanda Esperanto-movado kaj pri la amika interkomunikigo inter diverslandaj esperantistoj, la laborantoj de la Esperanta Sekcio de Radio Pekino faris multajn preparajn laborojn. Kaj nun realiĝis la deziro de la vastaj amasoj de esperantistoj.

La laborantoj de la nomita sekcio esperas, ke iliaj aŭskultantoj konstante prezentos al ili opinion por plibonigi ilian laboron.

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

Pekina Tempo	GMT	Al Regionoj	Ondoj(m)	kHz
4:00-4:30	20:00-20:30	Eŭropo	43.7	6860
			31.9	9380
19:00-19:30	11:00-11:30	Japanio, Koreio	41	7315
			30.4	9860
21:00-21:30	13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.6	11685
			19.8	15145

(Je la 30-a de oktobro, 1979, oni komencis ĉiutagan elsendon.)



GRANDA SPORTKUNVENO

de Xue Jinqian

LA 15-an de septembro, 1979, flirtis koloraj flagoj en sunbriloj super la Laborista Stadiono de Beijing (Pekino). Tie inaŭguriĝis la Kvara Sportkunveno de la Ĉina Popola Respubliko.

Tiu sportkunveno estis la plej grandskala en Ĉinio post la fondiĝo de la popola respubliko. En ĝi okazis konkursoj de 34 sportbranĉoj kaj partoprenis 31 sportistaj grupoj el ĉiuj partoj de la lando, inkluzive de Taiwan (Tajvan). La nombro de la personoj de la sportistoj partoprenintaj en la preparaj kaj decidaj konkursoj atingis 15,400.

Kiam sportistoj kuris en la stadionon alte tenante torĉojn simbolantajn la novan longmarŝon, tuj eksplodis tondra aplaŭdo ĉe la partiaj kaj registaraj gvidantoj de nia lando, diverslandaj honoraj gastoj kaj 80,000 popolanoj de nia ĉefurbo kiuj ĉeestis la inaŭguron. La Stafetokurado kun Torĉo de la Nova Longa Marŝo de la sportkunveno komenciĝis je la 1-a de julio ĉijare, en Shanghai (Ŝanhajo), la naskiĝloko de la Komunista Partio de Ĉinio. Ĝi daŭris 77

tagojn, dum kiuj la torĉoportantoj trakuris la sanktajn revoluciajn lokojn Jingtangshan (Ginggangŝan), Zunyi (Zunji) kaj Yan'an (Jan'an), kaj atingis la stadionon post traŭro de pli ol 12,000 kilometroj. La torĉostafeto kaj la grupa gimnastiko "Nova Longmarŝo" farita de pli ol 16,000 geknaboj formis du vivecajn belajn bildojn imponajn, kiuj manifestis la volon kaj firman decidon de la ĉina popolo fari unuanime la novan longmarŝon de la socialisma konstruado.

En la konkursado de la sportkunveno rompiĝis 5 mondaj rekordoj de aviadilaj modeloj, 3 mondaj rekordoj de junula halterlevo, 8 aziaj rekordoj kaj 102 landaj rekordoj, kaj 3 mondaj rekordoj de pafado estis egalitaj. Kaj krome, 3 mondaj rekordoj estis superitaj, 1 monda rekordo estis egalita kaj 13 landaj rekordoj estis rompigitaj en la pafa kaj arkopafa konkursoj laŭ parbatala sistemo.

Kvar rekordoj de la lasta Azia Sportkunveno estis superitaj en naĝkonkursado. La landa rekordo de 800-metra virina rapidnaĝo estis rompita samtempe de 7 knabinoj kun meznombra aĝo de 15 jaroj, inter kiuj Yu Ping altigis la landan rekordon je 20 sekundoj.

La halterlevaj sportistoj Wu Shude de Guangxi (Guanghi) kaj Zhang Yaoping de Jiangsu (Giangu) rompis 3 mondajn rekordojn de junuloj. En la konkursado 54 halterlevistoj atingis la postulatan normon de partoprenanto al la olimpikoj en la venonta jaro.


En la konkurso de virina altosalto, la fama sportistino Zheng Dazhen de Fujian (Fugian)-provinco ne atingis sian rezulton en la 8-a Azia Sportkunveno pro nebona sanstato kaj ŝin superis Zhejiang (Ĝegiang)-provinca sportistino Ye Peisu per rekordo de 1.85 metroj. Ankaŭ aliaj 5 sportistinoj atingis la nivelon de 1.80 metroj.

En la konkurso de virina pistola lanta kaj rapida pafado, Shandong (Ŝandong)-provinca sportistino Gao Jianmin egalas, per sia rezulto de 592 cirkloj, la mondan rekordon kreitan de la sovetunia sportistino en 1977.

En la konkurso de vira pafado 3 x 40, Shaanxi (Ŝenhi)-provinca sportisto Lin Bo egalas, per sia rezulto de 400 cirkloj, la mondan rekordon de vira kuŝa pafado per memelektita etkalibra fusilo.

Ankaŭ la arta nivelo de multaj el la gimnastikaj teamoj estis relative multe altigita. Aparte streĉe iris la virina kunmetita individua decida konkurso. En plenumado de memelektitaj movoj, multaj el la sportistinoj faris malfacilegajn movojn kun nacia karakterizaĵo. Fine la Shanghai-a sportistino Zhu Zheng gajnis la ĉampionecon en la nomita konkurso.


Ankoraŭ pli altan nivelon montris ĉinaj sportistoj en la plonĝa konkurso en la kunveno. La malfacilaj movoj en la konkurso de plonĝado kun memelektita movo preskaŭ fariĝis ĝenerale plenumendaj movoj. Tio neniam okazis en la ĉinaj sportkunvenoj aŭ la mondaj olimpikoj. Kaj per sia malfacilega movo, Guangdong-provinca sportisto Wu Guocun gajnis la ĉampionecon en la konkurso de vira tramliloplono. Neniu el la plonĝistoj en la konkursoj superis la aĝon de 22 jaroj kaj ĉiuj oraj, arĝentaj kaj kupraj medaloj por vira kaj virina turplonĝoj estis gajnitaj de geknaboj kun aĝo de malpli ol 17 jaroj.



Bicikla konkurso



Stafeto




Veĉi-konkurso


En la diversaj pilkludaj konkursoj, elsaltis novaj eminentaj teamoj kaj multaj novaj lertuloj, kaj nova progreso en tekniko estis manifestita de la partoprenintaj teamoj. Aparte intensajn kaj ekscitajn spektaklojn prezentis la konkurso inter la korbopilka teamoj de la Libe-
riga Armeo kaj Hubei-provinco kaj tiu inter la piedpilka teamoj de Shandong-provinco kaj Bejing por ĉampioneco.

Malgranda estas la poento-diferenco inter la unuaj ses venkintoj en ĉiuj konkursoj de tiu sportkunveno. Tio montras, ke ĝenerale altiĝis la tekniko de ĉiuj sportistoj kaj teamoj.

La Kvara Tutlanda Sportkunveno ankaŭ estas revuado pri la sporto de nia lando. En la konkursoj oni povis vidi, ke ankoraŭ estas granda distanco inter la ĉina sporta nivelo kaj la internacia avangarda nivelo, kaj la ĉinaj sportistoj devas fari grandajn klopodojn por atingi la avangardojn en tekniko, fizika kvalito kaj konkursa sperto. Tial oni povas diri, ke la Kvara Tutlanda Sportkunveno estas nova startopunkto por la ĉinaj sportoj en la marŝado al la monda avangarda nivelo.

*Virina par-
ludo de volano*





“POEMOJ” de MAŬ ZEDONG

(1Es-964-s)

En tiun ĉi libron estas metitaj 39 poemoj verkitaj de prezidanto Maŭ Zedong en la jaroj 1925-1965, inkluzive de Revizito al Ginggaŝan kaj Dialogo de Du Birdoj, publikigitaj en la Novjara Tago de 1976.

72 paĝoj 13.5 × 21.5 cm.

Prezo: £0.45 US\$0.90 FF4.20 DM2.90

Eldoninto: Fremdlingva Eldonejo, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala Distribuanto:

Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Mendu ĉe la peranto aŭ rekte ĉe la ĝenerala distribuanto!





EN la Kvara Tutlanda Sportkunveno multaj veteranaj sportistoj daŭre tenis bonajn rekordojn, dum multaj junuloj kuratingis ilin. Tio manifestis la prosperon de la sporta afero de Ĉinio.

SUR PLONĜTURO

La finalo de virina plonĝo okazigita en la 23-a de septembro puŝis la plonĝan konkurson al la plej alta tajdo. Plonĝistinoj Chen Xiaoxia de Guangdong-provinco kaj Shi Meiqin de Shanghai estis en konkuro por ĉampioneco. Ili, kvazaŭ mevoj gracie glisantaj, prezentis sian altan teknikon.

Chen Xiaoxia gajnis la ĉampionecon de turplonĝo en la Oka Azia Sportkunveno kaj oran medalon de plonĝo en la Dekaj Monda Studenta Sportkunveno. Ŝi estas 17-jara kaj komencis plonĝadon en la aĝo de 12 jaroj. Dank' al sia diligenteco en trejnado ŝi rapide progresis en la arto kaj multfoje venkis en internaciaj kaj enlandaj konkursoj.

Shi Meiqin, samaĝulo de Chen, lertas en trampiloplonĝo. En la Oka Azia Sportkunveno ŝi gajnis la ĉampionecon de la virina trampiloplonĝo. Shi Meiqin estas tre diligenta en ekzercado kaj neniam deprimiĝis pro malsukceso. En la Dekaj Monda Studenta Sportkunveno ŝi akiris kupran medalon pro la malbona sanstato.

Post tio ŝi ĵuris glorigi sian patrolandon per pli bona tekniko. Ŝi prenis sian partoprenon en ĉifoj konkurso kiel provludon por marŝi al la monda alta nivelo. En la komenco la poentoj de Chen kaj Shi estis tre proksimaj kaj post la faro de 5 devigaj plonĝoj iliaj poentoj diferencis nur je 1.89. Tiam Shi Meiqin plene disvolvis sian avantaĝon de alta desalto kaj faris du malfacilegajn movojn de du-kaj-duonobla saltumo dorsen kaj du-kaj-duonobla saltumo antaŭen, kaj per tio gajnis la plej altajn poentojn, kiuj superis tiujn de Chen Xiaoxia je 13.99. La lasta plonĝo de Shi Meiqin estis tre eleganta kaj bele impresis la spektantojn. La totalaj poentoj de Shi Meiqin estas 721.86, t.e. je 22.66 pli multaj ol tiuj de Chen Xiaoxia.


NOVA REKORDO DE HALTERLEVO

Estis vespero de la 16-a de septembro. En la Beijing-a Sporta Halo iris konkurso de halterlevo.


15 minutojn post la oka, plejparto de la konkursantoj de ŝirlevo jam plenumis tri provlevojn. Venis la vico por Wu Shude el Guangxi, kiu dufoje rompis la mondajn rekordojn de junula halterlevo.

Wu Shude aplombe suriris la podion. La pezo de lia unua provlevo estis 102.5 kg., egala al tiu de la tria loko en la Monda Halterleva Ĉampioneca Konkurso en 1968, kaj li sukcesis en la levo en unu fojo.


La aŭtomata poentotabulo montris 108 kg. Tiu pezo estis je 0.5 kg. pli granda ol la rekordo kreita de li mem en Hungario en junio de 1969. En la halo regis silento, kaj nur aŭdiĝis la susurado de kamerao. Wu Shude faris profundan enspiron kaj kaptis la halteron. "Je lia krio "lev", la haltero estis jam levita super la kapon. Juĝisto tuj lumigis la blankan signalon: Sukcesis la levo.



Chen Xiaoxia



Shi Meiqin



Wu Shude

Iu junulino alkuris kaj prezentis al li faskon da freŝaj floroj.

ARKOPAFISTINO GUO MEIZHEN

La viroj de sibo-nacieco de nia lando tre ŝatas arkopafadon. Ankaŭ virinoj de tiu nacieco tre ŝatas tion. En la konkurso de arkopafo de ĉifoja sportkunveno arkopafistino Guo Meizhen de sibo-nacieco de Xinjiang gajnis la ĉampionecon de ĉiudisciplina pafado. Estis la unua fojo



Guo Meizhen

por Xinjiang gajni la ĉampionecon de tiu sportobranĉo en la lastaj 30 jaroj.

Antaŭe Guo Meizhen estis instruistino en mezlernejo kaj ekŝatis arkopafadon de sia infaneco. Ŝi ofte ekzercis sin en pafado post instruado.

En la loĝejo por la sportistoj de Xinjiang, oni ofte povis vidi Guo Meizhen en ekzercado en tre frua mateno. Iun matenon la trejnistino estis vekita de bruo. Ŝi ellitiĝis kaj vidis, ke Guo Meizhen plene ŝvitis de ekzercado per brusto-tenadigilo kun 4 risortoj. La trejnistino diris al ŝi: "Estas tro frue. Kaj hodiaŭ vi devos fari tuttagan ekzercadon. Bone zorgu pri via sano." Malgranda Guo viŝis sian vizaĝon kaj ridete respondis: "Mi uzas la alian pafarkon 4 funtojn pli pezan ol la malnova, kaj se mi ne faros sufiĉan ekzercadon, kiel mi povos atingi bonan sukceson?"

Ŝian penemon rekompencis bona sukceso. En la prova pafado antaŭ la konkurso Guo akiris 329 cirklojn, kiuj estis je 5 cirklojn malpli multaj ol tiuj de la monda rekordo. En tiu ĉi konkurso ŝi gajnis la ĉampionecon, rompis unu landan rekordon kaj egalis tri landajn rekordojn.

PAFISTINO WU LANYING

En la lazura firmamento ŝvebis blankaj nuboj. En la pafejo en la okcidenta antaŭurbo de Bei-



Wu Lanying

jing iris vira diskopafao. Inter la 12 konkursantoj troviĝis unu virino kiu tiris al si grandan atenton de la spektantoj. Kiu ŝi estis? Kial ŝi partoprenis en la vira konkurso?

Ŝi estas 24-jara Wu Lanying veninta de Henan-provinco. Ŝi estas ne alta, tamen fortika kaj havas mallongajn harligojn sur la kapo. Kiam ŝi komencis diskopafon ekde 1973, ŝi jam havis ambicion rompi la mondan rekordon. Sed nun ege malmultaj virinoj en nia lando partoprenas en tia pafado kaj ŝi devis konkursi kun viroj. Tio tamen estas permesata laŭ la internacia regularo.

Posttagmeze de la 19-a de septembro, en la konkurso restis nur Wu Lanying kaj aliaj du viroj. Komenciĝis la pafado. Wu Lanying trafis 97 el la 100 flugantaj argildiskoj. Restis 25 diskoj ne eljetitaj, kaj ŝi ŝanĝis sian paflokon de la unua al la kvina. Sed sur la sesa pafloko oni eljetis diskon neregule kaj la juĝisto petis ripeti. Tio skuetis ŝin kaj ŝi maltrafis la diskon. Ŝi atentigis sin pri aplombeco. Sur la sepa kaj oka paflokoj ŝi ĉiufoje trafis la diskojn. Ŝiaj totalaj poentoj atingis 194, kiuj estis je 10 kaj 5 poentoj pli altaj respektive ol tiuj de la landa vira rekordo kaj de la monda virina rekordo. La pafejo ekbolis. Oni ĉirkaŭis kaj gratulis ŝin pro ŝia sukceso.

BRAVA PARAŜUTISTINO YU AIHUA

La vira kaj virina unuopa paraŝuta konkurso estis iranta sur la aerodromo Shahe de Beijing.

Traflugis aeroplano kaj tuj en la ĉielo aperis nigra punkto. Iom poste la punkto fariĝis homfiguro. Ĝi falis en rapideco de 50-70 metroj po sekundo. La fluganta homo prenis siajn membrajn kiel rudrojn. Li faris 360-gradajn dekstran, maldekstran kaj transkapan turniĝojn. Post tio li malfermis la paraŝuton. Ĉiujn tiujn movojn li plenumis en 7-8 sekundoj.

La paraŝuto pli kaj pli malaltiĝis kaj oni vidis, ke sub ĝi estas knabino. Ŝi estis tiel svelta, kvaŭzaŭ feino descendis de la ĉielo. Apenaŭ ŝi gracie surteriĝis, la aerodromo ekbolis de huraado.

Ŝi estas Yu Aihua, 20-jara Shandong-provincano kaj nun servanta en la Ĉina Popola Libe-



Yu Aihua

riga Armeo. Ŝi sesfoje rompis la landajn rekordojn en 5 jaroj de sia paraŝutado. En la internacia konkurso de 1978 en Svedio, ŝi estis multe laŭdata pro sia elstara tekniko.

Antaŭ kelkaj tagoj, en la virina 1,000-metra unuopa fiksloka paraŝutado ŝi gajnis la unuan lokon, rompinte la landan rekordon de tiu disciplino. Nun ŝi akiris oran medalon en la virina arta paraŝutado kaj gajnis la ĉampionecon de la virina unuopa kunmetita konkurso.

Oni respektoplene rigardis ŝin kaj ŝiaj kolegoj etendis al ŝi varmajn manojn por gratuli ŝin pro la gajno de 3 oraj medaloj.



La elektra industrio de Ĉinio

ĈINIO akiris grandajn sukcesojn en disvolvado de elektra industrio. En 1978 la generatora kapacito de la elektrejoj de Ĉinio atingis pli ol 50,000,000 kv., kaj tiujare Ĉinio produktis 256,550,000,000 kv.-horojn da elektro. Ili estis respektive 30-oblo kaj 58-oblo de tiuj en 1949. Per tio Ĉinio leviĝis de la 25-a loko al la 7-a inter la elektroproduktantaj landoj de la mondo.


FORTAJ KONTRASTOJ

Ĉinio komencis produkti elektron en 1882. Tiujare fremdlandanoj konstruis elektrejon en Shanghai (Ŝanhajo), sed ĝia generatoro povis liveri elektron al nur 16 arklampoj, ĉefe muntitaj ambaŭflanke de la strato apud Huangpu-rivero. En 1912 Ĉinio konstruis sian unuan hidroelektrejon en Shilongba de Yunnan (Junnan)-provinco, ekipitan per du hidroturbinaj generatoroj kun po-peca kapacito de nur 720 kv. De 1882 ĝis la Liberiĝo de la tuta lando

en 1949, la malnova Ĉinio konstruis elektrejojn kun totala generatora kapacito de 1,848,600 kv., kaj la jara produktokvanto estis nur 4,310,000,000 kv.-horoj. 80% de tiuj elektrejoj troviĝis en la marbordaj provincoj kaj nur malmultaj el ili en la vasta nordokcidenta kaj sudokcidenta Ĉinio. Tiam nia elektra industrio plejparte estis en la manoj de fremdlandanoj, kaj krome Ĉinio ne havis sian industrion por fabriki elektroproduktajn ekipaĵojn.

Post la fondiĝo de la Popola Respubliko, la registaro donis tre grandan atenton al la disvolviĝo de la elektra industrio. Ĉinio havas abundajn energiajn fontojn, ĝiaj akvoenergiaj riĉfontoj atingis 580,000,000 kv. kaj okupas la unuan lokon en la mondo. Kaj ankaŭ ĝiaj subteraj riĉfontoj de karbo kaj petrolo estas en la antaŭaj lokoj de la mondo. Ĉio tio havigis al ni favorajn kondiĉojn por disvolvi elektran industrion. Laŭ niaj konkretaj kondiĉoj nia

La centra kontrolejo de la Hidroelektrejo de Liujixia



registro ellaboris niajn politikojn de energio kaj orientilon por disvolvi elektran industrion t.e. "samtempe konstrui elektrejojn grandajn, mezgrandajn kaj malgrandajn, hidroelektrejojn kaj termoelektrejojn". Dank' al nia klopodado dum 30 jaroj, nia elektra industrio ricevis grandan disvolviĝon, ĉu en la marbordaj regionoj aŭ en la internaj regionoj, ĉu en la urboj aŭ en la kamparo.

En la pasintaj 30 jaroj, niaj inĝenieroj kaj teknikistoj multe levis sian teknikan nivelon en projektado, muntado kaj fabrikado de generatoroj. Ili pene klopodadis, modeste lernis de fremdaj landoj kaj fine konstruis tri grandajn bazojn de elektra ekipaĵoj sinsekve en Harbin, Shanghai kaj Sichuan (Siĉuan). Tiuj bazoj povas fabriki ne nur pogrande generatorojn de 200,000 kv., sed ankaŭ produktis nombron da generatoroj de 300,000 kv. Nun, nia elektra industrio ne plu dependas de fremdaj landoj en projektado, fabrikado kaj muntado de elektroproduktaj ekipaĵoj, kaj ni konstruis unuapaŝe, surbaze de niaj propraj kondiĉoj, kompletan sistemon de elektra industrio.


KONSTRUADO DE GRANDAJ ELEKTREJOJ

En la lastaj du jaroj de "Nova Longa Marŝo" al kvar modernigoj, Ĉinio jam finkonstruis nombron da grandaj elektrejoj.

Ilia generatora kapacito atingis pli ol 8,000,000 kv. kaj ili ĉiujare produktas 53,400,000,000 kv.-horoj da elektro por la nacia ekonomio.

Antaŭ la Liberiĝo nur la generatoraj kapacitoj de la Fengman-a Hidroelektrejo en nordorienta Ĉinio kaj la Yangshupu-a Termoelektrejo en Shanghai superis 100,000 kv. Nun Ĉinio havas 145 termoelektrejojn, kaj hidroelektrejojn, kies kapacito superis 100,000 kv. kaj en tiuj elektrejoj funkcias 132 generatoroj, kies kapacito superis 100,000 kv. La Liujiaxia-a Hidroelektrejo sur la supra parto de Huanghe-rivero (la Flava Rivero) estas la plej granda el niaj hidroelektrejoj. Ĝia baraĵo altas 147 metrojn kaj la akvorezervejo povas enteni 5,700,000,000 kubmetrojn da akvo. Ĝiaj generatoroj kun totala kapacito de 1,225,000 kv. ĉiujare povas produkti 5,700,000,000 kv.-horojn da elektro. La Gezhouba-a Hidroelektrejo en konstruado situas sur la meza parto de Changjiang (Jangzi)-rivero (legu la koncernan artikolon en la 5-a numero de 1979 de EPC), kie dekmiloj da laboristoj estas konstruantaj baraĵon sur la trunko de tiu rivero. Oni instalos al ĝi generatorojn kun kapacito de 2,710,000 kv., t.e. ĝia generatora kapacito estos pli ol duoblo de tiu de la Liujiaxia-a Hidroelektrejo. Apud la fama karba urbo Datong en Ĉinio oni konstruas ĉeminejan termoelektrejon kun generatora ka-

La nilona akvobaraĵo de la Hejiang-a Hidroelektrejo de Fengkai-gubernio, Guangdong-provinco




pacito de 1,200,000 kv., kiu turnos karbon en elektron ĉeloke, sendos plimulte da elektro al la industriaj bazoj de norda Ĉinio, per alttensiaj transsendaj lineoj.

Krome, Ĉinio konstruas nombron da ĉeminejaj termoelektrejoj kun generatora kapacito de 600,000 ĝis 2,000,000 kv. ĉe Tangshan, Xuzhou, Huainan, Huaibei, Pingdingshan kaj aliaj karbominejoj. La ĉeminejaj elektrejoj reduktas polucion de industriaj urboj. Tiuj hidro- kaj termoelektrejoj multe fortigos nian elektran industrion.

LA DISVOLVIĜO DE LA ELEKTRA INDUSTRIO EN LA INTERNAJ REGIONOJ KAJ KAMPARO

Samtempe kun la disvolviĝo de la marborda elektra industrio, Ĉinio ankaŭ energie konstruis elektran industrion en siaj internaj regionoj. En la pasintaj 30 jaroj nia lando konstruis tri grandajn elektrajn retojn en nordorienta, orienta kaj norda Ĉinio. En sudokcidenta kaj nordokcidenta Ĉinio, kie antaŭe estis tre malgranda elektra industrio, la elektra industrio ricevis rapidan disvolviĝon. Laŭ statistiko de 1978, la generatora kapacito de la elektrejoj de Sichuan, Yunnan (Junnan), Guizhou (Gujĝoŭ) kaj Tibe-


Eksperimenta elektrejo kun tera varma vaporo kiel movforto en norda Tibeto



to en sudokcidenta Ĉinio pliiĝis 87-oble kompare kun tiu de 1949 kaj la procentoj de ĝi en la totala generatora kapacito de Ĉinio pliiĝis de 3.7% ĝis 10.6%; kaj tiu de la elektrejoj de Shaanxi (Ŝenhi), Gansu, Qinghai (Kingham), Ningxia (Ninghia), Xinjiang (Xingiang) en nordokcidenta Ĉinio pliiĝis 382-oble kompare kun tiu de 1949 kaj la procentoj de ĝi en la totala generatora kapacito pliiĝis de 0.7% ĝis 9.5%. Tio multe plibonigis la neracian dislokiĝon de nia elektra industrio.

Krom ke la grandaj riveroj Changjiang kaj Huanghe kiuj estas riĉaj je akvoenergio, Ĉinio havas ankaŭ pli ol 1,200 riverojn, kies areo de baseno superis 1,000 kvadratajn kilometrojn. Precipe en suda Ĉinio ĉie troviĝas riveroj kaj akvofaloj. El la pli ol dumil gubernioj de Ĉinio, pli ol duono de la gubernioj havas akvoenergian riĉfonton por konstrui hidroelektrejojn kun generatora kapacito de pli ol 10,000 kv. Pro tio la elektra industrio de Ĉinio karakteriziĝas per tio, ke popolaj komunumoj en la kamparo konstruis multajn malgrandajn hidroelektrejojn. En tio la ŝtato donis al ili grandan helpon per pruntedono de mono kaj subvencio, kaj dank' al la mona kaj materia subteno rapide aperis ĉie en montvilaĝoj de Ĉinio malgrandaj hidroelektrejoj de komunumoj kiel fungoj post pluvo. Tiuj hidroelektrejoj ĝenerale havas generatoran kapaciton de 2-3 kv. ĝis 10,000 kv. Tiaj hidroelektrejoj bezonas nur malgrandan kapitalon kaj povas rapide alporti bonon. Ĝis ĉijara aprilo nia lando jam konstruis pli ol 88,000 malgrandajn hidroelektrejojn en 1,500 gubernioj, ilia generatora kapacito konsistigas 17% de la totala generatora kapacito de la tuta lando.

Antaŭ la Liberiĝo neniom da elektro estis uzita en la agrikulturo de nia lando. Dank' al starigo de kamparaj malgrandaj hidroelektrejoj kaj elektro-provizo de la grandaj elektrejoj, rapide kreskis la kvanto de elektro uzata en nia agrikulturo. Laŭ statistiko de 1978, nia agrikulturo tiujare konsumis 28,700,000,000 kv.-horojn da elektro, t.e. 12.5% de la totala elektrokonsuma kvanto de industrio kaj agrikulturo de nia lando. La konstruitaj malgrandaj



*La du-ŝtupa hidroelektrejo de
Putao-komunumo de Xinjiang*

hidroelektrejoj liveras malkaran energion al la vasta kamparo. Nun motoraj pumpiloj anstataŭis noriojn tiratajn de bovoj, kaj elektraj mueliloj tiujn puŝatajn per homfortoj. Elektro ludas tre gravan rolon en mekanizado de agrikulturo kaj disvolvo de la lokaj industrioj kaj la komunumaj kaj brigadaj entreprenoj.

Kvankam nia elektra industrio akiris kompare grandajn sukcesojn, tamen nia elektrokonsuma nivelo estas tre malalta. La Dua Sesio de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso kunvokita en junio ĉijare decidis plirapidigi la disvolvon de la elektra industrio en la reordigo de la nacia ekonomio por plenumi la grandajn bezonojn de la modernigo de agrikulturo, industrio, sciencoj kaj teknikoj kaj nacidefendo.

Nove Ricevitaj Libroj

DE LA KRITIKANTO:

Sarkasme kaj Entuziasme Esearo de Miyamoto masao, 151-paĝa libro kiel la unua eldonaĵo de la nove fondita eldonejo, kies adreso estas: S-ro Mine Yositaka, Kitahama-Kitawaki 29-16, Takasago, Hyogo-ken, 671-01 Japanio. La libro kostas 18 gld. aŭ 9 dol.

DE WOUTER F. PILGER,
LELYSTAD, NEDERLANDO:

Multatuli: **Ribela Saĝo**

Tondaĵoj

R. Rossetti: **Spegulo de Esp-aj Stiloj**

R. Hauptenthal: **La Kontribuo de K. Kalocsay al la Esp-a Kulturo Ne Ciam**

Amoro kaj Amo

Soife Mortas Mi

Ulenspieghel: **Tio Estas Strigspiegulo**

En Frua Majmateno

DE BUDHANA LIGO ESPERANTISTA

La Koro de l' Budhismo 52-paĝa sistema kurso en budhismo

DE UEA

Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto La libron verkis J. Wells, kiu estas lekciisto pri fonetiko en la University College Londono (parto de la Universitato de Londono) kaj membro de la Akademio de Esperanto. La verko estas bazita sur la prelegoj faritaj en ISU en la kadro de la 61-a UK kaj rearanĝitaj multloke. Studemaj esperantistoj trovos ĝin interesa.



Multipetala jasmeno en antaŭurbo de Guangzhou (Kantono)

EN antaŭurbo de Guangzhou (Kantono) troviĝas la Popola Komunumo Hedong, sur kies pli ol 1,000 muoj da agroj (1 muo=1/15 hektaro) estas plantitaj riĉ-korolaj jasmenoj propraj al nia lando. Se vi vizitas la komunumon dum disflorado de jasmenoj en printempo aŭ aŭtuno, vi sentas vin kvazaŭ en aroma neĝmaro. Ĉiun frumatenton komunumanoj kolektas la nokte ekflorintajn burĝonojn kaj tuj transportas ilin al la Guangzhou-a Aromaja Fabriko. Laborantoj de la fabriko metas la freŝajn florojn en maŝinojn kun solvilo por akiri jasmenan koncentritaĵon. Per miksaĵoj de tiu koncentritaĵo kaj aliaj aromaĵoj oni povas fabrikigi cigaredojn, ĉokoladon, belŝmirajon kaj parfumon kun jasmena aromo. Per tiaj jasmenfloroj oni povas aromigi teon ŝatatan de la popoloj de Ĉinio kaj la Sudorienta Azio.

Bredado de moskulo



Nuntempe, la Guangzhou-a Aromaja Fabriko produktas 20 specojn de naturaj kaj sintezaj aromaĵoj kaj ĉ. cent specojn de esencoj.

Ĉinio havas longan historion en utiligo de aromaj vegetaloj kaj viveredoj. Antaŭ pli ol dumil jaroj nia laboranta popolo jam povis fari osmant-vinon kaj prepari parfumon el bonodoraj herboj. La fama medicinisto de Ming-dinastio Li Shizhen (1518-1593 p.K.) listigis, en sia medicina libro, grandan nombron da aromaj vegetaloj uzataj por medikamentoj. Rilate al la animala aromaĵo mosko, la ĉinaj medicinaj rondoj de longe uzas ĝin kiel medikamenton por urĝa savo. Tamen, en la malnova Ĉinio ne estis moderna aromaja industrio.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la aromaja industrio disvolviĝis paŝon post paŝo. Nun jam formiĝis unuapaŝe kompleta aromaja industrio. En la tuta lando sin trovas 32 entreprenoj de aromaĵoj, kiuj povas produkti 112 specojn de naturaj aromaĵoj kaj 456 specojn de esencoj. Dank' al la disvolviĝo de la kemia industrio Ĉinio jam povas produkti proksimume 200 specojn de sintezaj aromaĵoj, kiaj vanilino, kumarino, alfa amila cinam-aldehido k.a. Ankaŭ la tekniko de preparado de aromaĵoj havas iagradan altiĝon. Iuj aromajaj fabrikoj jam elfaris flortipajn esencojn similajn al tiuj el rozo kaj jasmeno, fruktotipajn el mandarino kaj banano, lignotipajn esencojn el orienta roz-santalo kaj fantazi-tipajn esencojn. Precipe rimarkinda estas la esenco simila al tiu de Maotai-vino farita el preskaŭ cent aromaĵoj

Kampo de jasmenoj



kaj bezonas relative altan teknikon de preparado.

Rilate al la naturaj aromajoj, pro la vasta teritorio kaj la modera klimato en Ĉinio kreskas 349 specoj de aromaj herboj, el kiuj pli ol cent estas utiligataj. La provincoj Yunnan (Junnan), Fujian (Fugian), Guangdong, Sichuan (Siĉuan) kaj Zhejiang (Ĝegiang) kaj la regiono Guangxi (Guanghi) en suda Ĉinio estas la ĉefaj produktetoj de naturaj aromajoj. Kaj rimarkinda kvanto da citronela oleo kaj kamfora oleo estas produktata en Taiwan-provinco. Rilate al la animalaj aromajoj, la popolo de nia lando de longe deprenas moskon kaj cibeton de moskuloj kaj cibetkatoj. Por akiri moskon kaj cibeton antaŭe oni ĉasis moskulojn kaj cibetkatojn, kio ekstreme malutilis al ilia kreskado kaj generado. Nun oni bredas la kaptitajn bestojn kaj faras al ili artefaritan fekundigon por protekti la valorajn animalojn kaj plivastigi la forton de aromajoj. Hodiaŭ en la Hangzhou-a Zoologia Ĝardeno preskaŭ 700 cibetkatoj estas bredataj.

La aromaja industrio havas intiman rilaton kun la produktado de ĉiutagaj necesajoj, manĝaĵoj, medikamentoj kaj cigaredoj. Per unu kilogramo da esenca likvaĵo oni povas aromigi 300 kilogramojn da kukoj aŭ 1,700 tubojn de dentpasto. Nuntempe la aromajoj kaj esencoj de Ĉinio estas ĉefe aplikataj en bombonoj, cigaredoj, tualetaj sapoj, dentpasto, medikamentoj, plasto, kaŭĉuko, lako kaj incenso, kaj ankaŭ malgrandkvante en kosmetikaĵoj.

Antaŭ nelonge, en Beijing (Pekino) okazis la Tutlanda Ekspozicio de Aromajoj kaj Esencoj. Kiam oni iris en la halon de la eksponejo, ili tuj sentis intensan aromon. Sur la planko bonorde staris florantaj jasmenoj kaj orkideoj en vazoj. En la montrofenestroj pendis multaj faskoj de specimenoj de aromaj herboj kaj floroj kaj montriĝis diversspecaj produktaĵoj bonodorigitaj per esencoj. En la eksponejo rigardantoj povis ekzameni iujn el la produktaĵoj kaj aĉeti ilin. La eŭkalipt-folia sukeraĵo kun eŭkalipt-folia oleo kaj timola likvaĵo estis varme akceptata. Se oni metas pecon da ĝi en la buŝon, oni tuj sentas agrablan bonodoron; se vi aĉetas unu skatolon da alumetoj kun pentritaj homfiguroj el la klasika romano "Songo en Ruĝa Buduaro", vi tuj perceptas ĝian fortan aromon. Se vi ludas kartojn kun marko "Galopanta Ĉevalo", vi povas senti bonodoron. En la ŝrankoj montriĝis ankaŭ aromigitaj ĉokoladoj, vinoj, fruktosuka trinkaĵo, bombonoj kaj kukoj, kaj bonodoraj ĉiutagaj necesajoj. Vere multaj kaj diversspecaj estis la belaj eksponaĵoj!

Ni transprenis el la mano de iu laboranto de la ekspozicio botelon da jasmena ekstrakto kaj malfermis ĝin por flari: Ĝi efektive bonodoris tre agrable! Hodiaŭ, la aromajoj produktitaj de Ĉinio estas eksportataj al 102 landoj kaj regionoj. Interalie, kristala mentolo kun marko Blanka Urso agrable aroma kaj sufiĉe brila estas ĉina tradicia eksporta produktaĵo kaj ĉ. triono de la vendkvanto de mentolo en la internacia merkato devenas de Ĉinio.

Bonkvalitaj rozoj produktitaj de Pingyin en Shandong-provinco



Aromajoj





TANG GEWEN:

La Antikva

Urbo Shaoxing

SUR la vasta kampo ĉe la piedo de Guij-monto en orienta Zhejiang-provinco dise lokiĝas multaj lagoj kaj basenoj, kaj kruciĝantaj riveroj ĉirkaŭas vilaĝojn kaj urbon kiel blankaj ĉenoj. Super riveroj kuŝas ŝtonaj pontoj, sub kiuj navigas velŝipoj tien kaj reen, kaj fumstrioj leviĝadas de sur la griztegolaj duklinaj tegmentoj ĉe la bordoj. Tia estas la aspekto de la ĉirkaŭaĵo de Shaoxing, la ĉina fame konata antikva kultura urbo sude de Changjiang-rivero (Jangzi-rivero).

Shaoxing, antaŭe nomata Guiji, sin trovas sudoriente de Hangzhou, la ĉefurbo de Zhejiang,

La Orienta Lago



de kie oni povas atingi ĝin per nur unuhora veturado per trajno.

LA ORIENTA LAGO

Pitoreska estas la ĉirkaŭaĵo de la urbo Shaoxing. Tie la montoj estas nealtaj kaj kontinue ondumaj, kaj la fluoj ne rapidaj kristale klaraj. La fama poeto de Song-dinastio Lu You (1125-1210) verkis jenajn versojn pri montvilaĝo en Guiji:

*“Finiĝis ŝajne l’ vojo pro la montoj
kaj riveroj,*

*Aperas jen vilaĝ’ en salikombro kaj
flor-helo.”*

Kaj aparte bela estas la Orienta Lago de Shaoxing.

Trapasinte la pordegon Wuyunmen oni povas atingi la pitoreskan lagon post irado de 3-4 kilometroj laŭ la riverbordo orienten. La loko famiĝis pro siaj mirindaj rokoj kaj belaj akvoj. Laŭ kroniko, antaŭ multaj jaroj tie estis bluŝtona monteto kovrata de densaj bambuoj. Kiam la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (221-210 a.K.) inspektis Guiji, li ripozis tie por manĝigi siajn ĉevalojn kaj donis al la monto la nomon Ruofen, kiu signifas en la ĉina lingvo aromon de bambuoj. Pro bonkvaliteco de la ŝtonoj de la monto oni komencis haki ĝiajn ŝtonojn ekde Han-dinastio (206 a.K. - 220 p.K.), kaj tio estigis multajn krutajn rokmuojn kaj kavernojn sur la monto. Poste pro erozio de monttorentoj kaj riveroj formiĝis tie dekoj da profundaj akvoplenaj kavernoj, kiuj sin prenis en unua formo de la hodiaŭa Orienta Lago. En Qing-dinastio (1644 - 1911), oni konstruis kioskojn sur Ruofen-monto kaj digon en ĝia apuda rivero. La

digo dividas la riveron en du partojn: ekstere de ĝi estas fluo kaj interne de ĝi lago, kaj tiel formiĝis bela pitoreskejo, kiu altiras al si multajn turistojn.


Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la popola registaro plurfoje asignis monon por riparigi la Orientan Lagon. Oni dragis kaj larĝigis la riveron, riparis kioskojn kaj ŝtonajn pontojn kaj plantis arbojn, kaj per tio multe plibeligis la lokon. En boato oni povas remi en zigzagajn kavernojn por sin plezurigi per rigardado de krutaj rokmuroj kaj la malhela klara akvo. Inter tiuj kavernoj Taogong estas la plej alloga. La plej granda profundeco de ĝia akvo atingas 20 metrojn kaj la alteco de ĝia akvosurfaco ĝis la montsupro estas ĉ. 60 metroj. Suprenrigardante de ĝia fundo oni povas vidi nur manplaton da ĉielo. Tamen, tute alia pejzaĝo prezentigas antaŭ vi, se vi ascendas Ruofen-monton laŭ ŝtuparoj borderitaj per balustradoj kaj rigardas foren de ĝi.

MAŬZOLEO DE YU

Shaoxing estas unu el la ĉinaj regionoj kun frue disvolviĝinta kulturo, kaj troviĝas tie multaj kulturaj restaĵoj de la antikvaj dinastioj.

Unu el la fame konataj historiaj restaĵoj de Shaoxing estas la Maŭzoleo de Yu ĉe la piedo de Guiji-monto, je 4 kilometroj sudoriente de la urbo. Laŭ legendo, antaŭ pli ol 4,000 jaroj la reĝo Yu de Xia-dinastio venigis tie dukojn por taksi la meritojn en brido de inundakvo, kaj poste li mortis tie. La maŭzoleo konstruiĝis en Han-dinastio, tamen ĝi multfoje detruigis kaj rekonstruiĝis dum miloj da jaroj. La nuna konstruaĵo estis farita en dinastioj Ming (1368-1644) kaj Qing. Post la Liberiĝo oni trifoje riparigis ĝin kaj la lasta riparo finplenumiĝis en printempo de la kuranta jaro. Nun la maŭzoleo aspektas ankoraŭ pli majesta kaj impona.

Suprenirante laŭ ŝtonaj ŝtuparoj oni trovas ĉe la larĝa kaj ebena monttallo altan monumenton kun surskribo "Maŭzoleo de Yu". Nordokcidente de ĝi estas palaca konstruaĵo — templo de la reĝo Yu. Enirinte ĝian pordegon oni povas vidi ŝtonan kioskon en kiu staras antikva memorŝtono surhavanta ideografiaĵojn en formo de



La Maŭzoleo de Yu

ranidoj, kiuj estas unu speco el la plej fruaj ideografiaĵoj gravuritaj sur ŝtono. En la templo konserviĝas ankaŭ memorŝtonoj pri kultado al Yu, faritaj en diversaj dinastioj. Trapasinte la mezan pordon kaj korton oni vidas la ĉefan halon. Dekstre de la halo estas simpla antikva ŝtona kiosko, en kiu staras tomboŝtono je du metroj alta, servanta laŭdire kiel marko de la Maŭzoleo de Yu. Por bridi inundakvon Yu trifoje preterpasis sian domon, tamen li ne eniris ĝin, kaj lia spirito estas multe laŭdata de la posteuloj. Kaj la historia restaĵo ja atestas la amon de la popolo al tiu legenda heroo.

Post la Liberiĝo, pli ol 4,700 kulturaj objektoj estis elterigitaj en Shaoxing, inter kiuj la plej valoraj estas bronzaj glavo kaj lanco de la periodo de la reĝo Goujian de Yue-regno. Ili kuŝis en la tero jam pli ol 2,000 jarojn, tamen nun ili ankoraŭ brilas kaj tinte sonas je ekfrapo. Tio montras ke en antikveco la metalurgio de Ĉinio ja multe progresis. La du objektoj ankaŭ rememorigas al ni interesan anekdoton pri la reĝo Goujian.

Antaŭ pli ol 2,400 jaroj Shaoxing estis la ĉefurbo de Yue-regno. Tiam Yue-regno batalis kun la najbara regno Wu (kies ĉefurbo estis Suzhou) kaj malvenkis pro la malforteco de sia armeo. La reĝo Guojian de Yue-regno fariĝis militkaptito kaj sate suferis turmentadon kaj in-

sultojn. Post kiam li estis liberigita kaj revenis al sia regno, li, por venĝi sin kontraŭ la malamiko, preferis dormi sur pajlo anstataŭ sur komforta lito, kaj gustumis pendantan galon je ĉiu manĝo. Li kuraĝigis la regnantojn diligente disvolvi produktadon kaj li mem terkulturis, kaj pro tio lia regno potenciĝis tagon post tago. Post 22 jaroj Goujian atakis per sia armeo kaj venkis ĝian reĝon Fuchai. De tiam Yue-regno fariĝis potenco en suda Ĉinio. Nun je dekoj da paŝoj okcidente de la pordego Ying-enmen de Shaoxing troviĝas domo Woxin, kie, laŭ legendo, Goujian gustumis galon kaj dormis sur pajlo. Forpasis jam multego da tempo, kaj la domo estas nur poste konstruita historia restaĵo, tamen legendo laŭdanta la spiriton de Goujian en strebado al potenciĝo vaste cirkulas inter la ĉinaj popoloj.

Shaoxing estas ankaŭ unu el la agadaj regionoj de la armeo de la Taiping-a Ĉiela Regno en la meza 19-a jarcento. Eĉ nun oni ankoraŭ povas trovi tie freskojn kaj aliajn objektojn pri la Taiping-a Ĉiela Regno.

MALNOVA DOMO DE LUSIN

La ĉina granda verkisto Lusin naskiĝis en Shaoxing je la 25-a de septembro de 1881. Antaŭ ol li forveturis aliloken por viziti pli altan lernejon en sia aĝo de 18 jaroj, li pasigis en Shaoxing siajn jarojn de infaneco kaj knabeco. Antaŭvespere de la Revolucio de 1911 li revenis al sia naskiĝloko kaj funkciis en iu mezlernejo kiel instruisto kaj samtempe sin okupis pri verkado.

La malnova domo de Lusin



Nun en Shaoxing instaligis Memordomo de Lusin, kiu konsistas el tri partoj: la malnova domo de Lusin, la privata lernejo Sanweishuwu, kie Lusin lernadis de la 12-jara aĝo ĝis la 17-jara, kaj la ekspoza halo pri la vivo de Lusin. La malnova domo de Lusin estas ordinara domo frontanta al la suno. Enirinte en ĝian pordon kaj trapasinte koridoron kaj malgrandan korton, oni atingas saloneton, kiu servis kiel manĝejo de Lusin. Dorse de la saloneto estis dormoĉambro de la patrino de Lusin, kie staris ŝia lito kaj tablo ĉe kiu Lusin faris hejmajn ekzercojn, kaj preskaŭ ĉiuj ĝiaj mebloj estas originalaj kaj metitaj kiel antaŭe. Dorse de la dormoĉambro, trans korteto estis kuirejo, kie malgranda Lusin korverŝe interparolis kun sia kamarana amiketo Zhang Runshui, t.e. Runtu, la heroo en la novelo de Lusin "Naskiĝloko". Post la kuirejo estis legomĝardeno, kiun Lusin priskribis en sia artikolo. Ĝi alportis al infano Lusin grandan plezuron.

Transpasinte la ŝoseon antaŭ la malnova domo de Lusin, kaj trapasinte la ponton oni atingas Sanweishuwu. Ĝi estis ordinara privata lernejo en malfruaj jaroj de Qing-dinastio en la urbo Shaoxing. Ĝi havas fundamente sian originalan aspekton: meze en ĝi staras tablo por la instruisto, ĉirkaŭe estas pupitroj por la lernantoj. Sur la pupitro de Lusin estas entrancita la vorto "frue". Oni diras, ke Lusin gravuris ĝin por atentigi sin ne malfruiĝi.

En la ekspoza halo apud la malnova domo de Lusin montriĝas manuskriptoj, leteroj, fotoj, artaĵoj, libroj k.a. sume pli ol 600 objektoj, kiuj registras la brilan vivon de la granda verkisto.

La lernejo Sanweishuwu en kiu Lusin studis en sia knabeco





Shaoxing

Shaoxing de Zhejiang-provinco estas fama antikva kultura urbo en suda Ĉinio. Tie sin trovas multaj kulturaj restaĵoj de pasintaj dinastioj, kiel ekzemple la Maŭzoleo de Yu (vivinta antaŭ 4,000 jaroj) ĉe la piedo de Guiji-monto.

Shaoxing ankaŭ estas naskiĝloko de granda literaturisto Lusin. Ĝi estas pitoreska kaj havas vastajn fekundajn kampojn, interkruciĝantajn riverojn kaj multajn lagojn kaj abundajn produktaĵojn, tial ĝi portas la nomon "lando riĉa je fiŝoj kaj rizo".

Shaoxing







Guiji-monto post negado




La Orienta Lago
post neĝado

La Kaverno Xian-
tao ĉe la Orienta
Lago






Templo de Yu



La antaúrbo de Shaoxing en printempo



Nova kvartalo de Xigaze

MINXING:

De Lhasa al Xigaze

MI finis mian viziton al la urbo Lhasa kaj aŭtobuse veturis al Xigaze. Ĉio, kion mi vidis kaj aŭdis dum la vojo, min porfunde impresis.

SURVOJE AL GYAZE

La aŭtobuso veturis sudokcidenten laŭ Lhasa-rivero, kaj du horojn poste ni alvenis al Quxur-ponto ĉe la kunfluejo de Lhasa- kaj Yarlungzangbo-riveroj. Tiu loko estas grava trapasejo en Tibeto. Yarlungzangbo-rivero kuras de okcidento al oriento, dividante Tibeton en du partojn, sudan kaj nordan. Oni devas trapasi tiun lokon por transporti agrikulturajn kaj brutajn produktaĵojn de la sudo de Yarlungzangbo-rivero al la urbo Lhasa, kaj industriajn produktaĵojn de landinterno kaj Lhasa al la sudo de la rivero, aŭ iri de Lhasa al la landlimoj inter Ĉinio kaj Nepalo kaj inter Ĉinio kaj Hindio.

Antaŭe tie estis nur kelkaj flosoj el bovledo por prami homojn kaj varojn. Nun jam konstruiĝis ponto el armita betono, kiu multe faciligis la trafikon.

La aŭtobuso transkuris la ponton kaj ni vidis krutan montegon, ĉirkaŭ kies supro ŝvebis nuboj kaj nebuloj kaj ĉe kies piedoj kuŝis verdaj kampoj. Kaj aŭtoj veturis malrapide kaj zigzage, unu post alia, sur la montdeklivo. Iu loka kadro en la sama aŭtobuso diris al mi, ke antaŭe tie estis nur vojstreko, oni bezonis unu tutan tagon por ascendi kaj descendi la monton, kaj la varoj estis dorse transportataj de homoj kaj bovoj. Sed hodiaŭ la totala longeco de la ŝoseoj en la regiono jam atingis 15,000 km. Sole la ŝtata transporta kompanio havas milojn da ŝarĝaŭtoj. La trafiko en Tibeto multe plifaciligis ol antaŭe.

Transveturinte la montegon, la aŭtobuso antaŭenmoviĝis sudokcidenten laŭborde de Yarzhoyum-lago. Ĉe la rando de la lago abundis akvoherboj, kaj ĉe la montpiedo kaj lagbordo kviete paŝtiĝis grupoj kaj grupoj da ŝafoj kaj gruntbovoj. La totala sumo de brutoj en Tibeto, grava paŝta regiono, estas pli-ol-duoblo de tiu antaŭ la demokratia reformo, tamen ilia kvalito ne multe altiĝis en la pasinteco. Dum la lastaj jaroj oni faris eksperimentojn por plibonigi la ŝafan rason kaj jam atingis rimarkindan rezulton.

La aŭtobuso veturis nelonge for de la lagbordo, kaj al niaj okuloj prezentiĝis ĉenoj da neĝaj montpintoj. Ili formis neĝan linion je pli ol 5,000 metroj super la marnivelo, tamen en la valo abundis verdaj kaj ankaŭ estis tendoj, bovoj kaj ŝafoj. Ni traveturis ravinon inter neĝpintoj kaj, ĉe la sunsubiro, venis al la gubernia urbo Gyaze apud Nyangqu-rivero.

EN LA GUBERNIO DE TAPIŜOJ

Gyaze, grava distribua centro de komercaĵoj, situas ĉe la kruciĝo de la tri vojoj kondukantaj al la landlima urbo Yadong, la regiona ĉefurbo Lhasa kaj alia urbo Xigaze. Antaŭe la paŝtistoj en la ĉirkaŭaĵo transportis siajn brutajn produktaĵojn en tiun lokon por vendi kaj aĉetis tie ĉiutagajn bezonaĵojn; la komercistoj eksportis iliajn brutajn produktaĵojn kaj enportis eksterlandajn varojn. Ĉe la loĝantoj de Gyaze kun oportuna provizo de ŝafa lano disvolviĝis la metiarto de teksado de tapiŝoj. Antaŭ la

Liberiĝo ĉirkaŭ duono de la tieaj familioj sin vivtenis per tapiŝ-teksado. La tapiŝoj de Gyaze kun desegno de drako kaj fenikso estis famaj siatempe pro kompakteco kaj originaleco de la stilo. Ili vaste vendiĝis en kaj ekster nia lando.

Mi vizitis la Gyaze-an Tapiŝfarejon, kies gvidanto Bainba Lhamo estas lerta en tapiŝ-teksado. Jam en sia infanaĝo ŝi lernis de siaj gepatroj tapiŝ-teksadon. Poste ŝia patro mortis kaj ŝia juna frato fariĝis sklavo. Ŝi havis neniun alian rimedon krom teksti tapiŝojn en la hejmo de sklavmastro por sin vivteni. Nur post la demokratia reformo ŝi fariĝis kadro ĉe la baza nivelo, dank' al la zorgado kaj edukado de la Partio kaj la popola registaro.

Bainba Lhamo diris, ke en la pasinteco la tapiŝistoj estis aŭ sklavoj de siaj mastroj aŭ kulioj de la komercistoj, kaj nur post la demokratia reformo ili vere emancipiĝis. Sub la gvido de la popola registaro ili fondis multajn tapiŝfarajn grupojn, poste tiuj ĉi sin organizis en tapiŝfarejon, kaj la produktado progresis pli rapide. Hodiaŭ la nombro de laboristoj en la naŭ laborejoj de la tapiŝfarejo atingis preskaŭ 300. La produktitaj tapiŝoj estas ne nur brilkoloraj kaj mode desegnitaj, sed ankaŭ molaj, malpezaj, fortikaj kaj elastaj. Tial ili estas multe laŭdataj kaj ŝatataj de la uzantoj. Nun tiaj tapiŝoj estas eksportataj al pli ol 10 eŭropaj kaj amerikaj landoj.

Mi vizitis la tapiŝteksan laborejon kaj la desegnejon, kie ekspoziciĝis multaj tapiŝoj kun



*Ĉe la lago
Yarzhoyum*

brilkoloraj desegnoj, kiaj “Du Drakoj Ludas kun Perlo”, “Drako kaj Fenikso en Flugo” kaj “Pino kaj Gruo”, kaj surmure pendis koloraj kaj delikate teksitaj murtapiŝoj, kiaj “La Granda Muro”, “Potala-palaco” kaj “Nanjing-pontego super Changjiang-rivero”. La veterana desegnisto Mima Toinzhu prezentis al mi diversajn desegnojn de tapiŝoj. Antaŭe oni prenis drakon kaj fenikson kiel la ĉefan desegnaĵon por Gyazetapiŝoj. Post la fondo de la tapiŝfarejo la laboristoj faris plibonigojn al la desegnaĵoj kaj kreis multajn aliajn novajn desegnojn, kiel ruĝverta gruo, pando, papilio kaj tigro. Nun la nombro de desegnoj plimultiĝis de 8 ĝis 51.

En Gyaze, krom la tapiŝfarejo funkciigata de la ŝtato, sin trovas ankaŭ tapiŝaj kooperativoj de la tri popolaj komunumoj en la antaŭurbo. Multaj komunumanoj prenas tapiŝ-teksadon kiel flankokupon nemalhaveblan.

AGRONOMIA INSTITUTO UTILA AL LA ALTEBENAĴO

Adiaŭinte Gyaze, mi veturis nordokcidenten laŭ Nyanqu-rivero. Ĝi fluas de sudoriento al nordokcidento kaj enfluas en Yarlungzangbo-riveron norde de Xigaze. En tiu loko la rivervalo estas 4,000 metrojn super la marnivelo, sed sur la larĝaj kaj ebenaj riverbordoj jam kreskas tritiko diktiga kaj longspika kaj sekalo foliriĉa kaj diksema, kaj ankaŭ kolzoplantoj kun ore flavaj floroj. Tion vidante, oni sentas sin kvazaŭ en la Centra Ebenajo de la lando en frua somero. Estas la Agronomia Instituto de Xigaze, kiu elkulturis tiel bonajn speciojn por la altebenaĵo.

Kiam mi venis en la Agronomian Instituton, ĝia gvidanto entuziasme konigis al mi ĝian laboron.

La Agronomia Instituto elkreskis el la Agronomia Eksperimentostacio, fondita en la jaro 1953. Tiujare Tan Changhua (nuna vicestro de la instituto) kaj liaj kamaradoj alportis al la loko bonspeciajn tritiksemojn el landinterno kaj faris la enkondukan eksperimentadon. Sed ili malsukcesis pro neadaptiĝo de la specioj al la medio. Li pensis, ke li devas selekti indiĝenajn,



Bainba Lhamo (maldekstre) interkonsiliĝas kun artistoj pri desegnado de tapiŝoj.

se la enkondukitaj semoj ne taŭgas. Sekve ĉiufoje, kiam maturiĝis la printempa tritiko, Tan iris al diversaj gubernioj por esplori kaj selekti. Por akiri bonajn tritikspikojn, li ofte veturis kelkcent kilometrojn foren, kun akvobotelo kaj manĝaĵo. Tiel li selektis ĉiujare, kaj fine li ricevis bonspeciajn Xigaze-tritiksemojn n-rojn 1, 2 kaj 3. La hektara produktokvanto de la bonspecia tritiko kulturata en granda areo kreskis je ĉ. 450 kilogramoj. Dum pli ol dek jaroj li elkulturis 13 speciojn de printempa tritiko, 9 de sekalo kaj 3 de kolzo, multajn el kiuj la registaro jam disvastigis.

En la Agronomia Instituto, akompanate de vicestro de la studa sekcio Luo, mi rigardis eksperimentokampon, sur kiu estis kulturataj 1,400 specioj de printempa tritiko, 800 de vintra tritiko kaj 800 de sekalo kaj kolzo. La instituto ne nur elkulturis multajn bonajn speciojn, sed ankaŭ ludis grandan rolon en trejnado de teknikistoj kaj disvastigo de novaj teknikoj. Nun la bonaj specioj estis ĝenerale kulturataj kaj promenoplugiloj kaj traktoroj anstataŭis la malnovtipajn tibetajn plugilojn. Dank' al la grandarea kulturado de bonaj specioj kaj plibonigo de kulturmanieroj fare de 18 gubernioj en Tibeto, ilia totala produktokvanto de greno triobliĝis kaj la hektara produktokvanto de la altproduktaj kampoj de scienc-esploraj taĉmentoj de nemal-

multaj popolkomunumoj jam superis 6,000 kilogramojn.

LA HIERAŬO KAJ HODIAŬO DE XIGAZE

Mi promenis sur stratoj de Xigaze kaj rimarkis kelkajn ter-ŝtonajn domojn kun malaltaj muroj kaj plata tegmento, lasitajn de la malnova Xigaze. Sed antaŭ mi prezentiĝis jam la nova Xigaze kun larĝaj asfaltitaj kaj gruzaj vojoj, ambaŭflanke borderitaj per foliriĉaj arboj. Staris vicoj da grandaj, altaj brikdomoj de institucioj, fabrikoj, magazenoj, hospitalo, poŝtofocejo, librovendejo kaj laboristaj loĝejoj; kvankam iuj el ili, kun plata tegmento, konstruiĝis el tero kaj ŝtonoj, tamen ili ĉiuj havis blankan muron kaj vitritajn pordojn kaj fenestrojn.

Cering, sekretario de la Partia Komitato de la Antaŭurba Distrikto, konigis al mi, ke la antaŭa Xigaze ampleksis nur la nordan parton de la nuna urbo, kun ĉ. pli ol 10,000 loĝantoj. Krom sklavmastroj, nobeloj kaj riĉaj komercistoj, tie loĝis multenombraj sklavoj, almozuloj kaj metiistoj, i.a. la almozuloj nombriĝis je pli ol 1,000. Ĉiujare la metiistoj devis labori senpage por la loka registaro, temploj kaj sklavmastroj. Ili havis tre malmultan tempon por fari agrikulturilojn, vestojn, ĉapelojn kaj arĝentaĵojn por sin vivteni. Post la demokratia reformo la popola registaro fondis 23 fabrikojn kaj kooperativojn por fari ledojn, tapiŝojn, agrikulturajn maŝinojn k.a. La metiistoj fariĝis laborantoj en tiuj fabrikoj.

Oriente de la malnova urbo kuŝas nova loĝkvartalo "Liberigo", kiun la popola registaro konstruigis ekskluzive por la malriĉuloj. Mi vizitis familion en tiu loĝkvartalo, kiam ĝiaj membroj sidis ĉirkaŭ tableto por trinki sekal-vinon. Eksciinte ke mi venis el Beijing, la mastro Cering stariĝis, varme konigis al mi sian familion kaj petis min trinki kune kun ili.


Mi demandis, kiel ili vivas nun. La maljuna patrino respondis ĝoje: "Multe pli bone ol antaŭe!" Ŝi rakontis, ke antaŭe ŝia edzo estis lignaĵisto. Foje li rifuzis plenumi servon kaj pro tio estis ĵetita en malliberejon kaj terure torturita. Post lia morto la vidvino povis fari nenion alian krom almozpeti kun siaj kvar filoj. Hodiaŭ ŝia plej aĝa filo kaj bofilino ambaŭ laboras en la Popola Hospitalo. La dua kaj tria filoj kaj iliaj edzinoj ĉiuj estas laboristoj de la forstokulturejo de Yadong. La plej juna filo Cering estas kadro kaj lia edzino estas laboristino. La tuta familio enspezas pli ol 600 juanojn ĉiumonate kaj ne plu maltrankviliĝas pro manko de manĝaĵoj kaj vestoj.

ZHAXI-LHUNBO-TEMPLO

Ĉiuj, kiuj venas al Xigaze, volas viziti Zhaxi-Lhunbo-templon, ĉar ĝi estas antikva konstruaĵo kaj loko kie Bainqen-lamaoj faris predikon. Kaj ankaŭ mi vizitis la templon.

Zhaxi-Lhunbo-templo komencis konstruiĝi en la jaro 1447. Tiam mortis la majstro de Dalai-

La templo Zhaxi-Lhunbo




lamao la Unua. Por memori lin, oni konstruis, ĉe la piedo de Nyiser-monto okcidente de Xigaze, budhan halon kun statuo de Ŝakjamunio. Dum la postaj 12 jaroj la Dalai-lamao konstruigis sinsekve en la ĉirkaŭaĵo unu grandan halon, tri budhajn halojn kaj kelkajn loĝdomojn por lamaoj, tiel ke la templo fariĝis sufiĉe granda. Poste la Centra Registaro dividis Tibeton en du partojn, la orientan kaj la okcidentan. Ĝi metis la orientan parton kun Lhasa kiel la centro sub la administradon de Dalai-lamao, kaj la okcidentan kun Xigaze kiel la centro sub tiun de Bainqen-lamao. La postaj Bainqen-lamaoj pli-grandigis la templon, kaj ĝi fariĝis la hodiaŭa grandioza konstruaĵaro kun totala areo de 300,000 kvadrataj metroj.

En la lastaj jaroj la ŝtato asignis 700,000 juanojn al riparo de la templo. Oni riparis 5 orajn tegmentojn kaj pli ol 20 sutro-legajn halojn, repentris pli ol 1,000 freskojn, riparis la Relikvan Stupaon de Bainqen-lamao la Kvara kaj reorumis pli ol 10,000 grandajn kaj malgrandajn statuojn, tiel ke la templo reakiris sian brilecon. Post riparo la templo malfermiĝis al la publiko ekde januaro kurantjare. Je lamaistaj festoj, la lokaj budhistoj iris libere al la templo por pilgrimi.

Akompanate de Qamba Chilai, mi iris unue en la Halon de Qamba en okcidento. Tie staras statuo de Qamba 26 metrojn alta. Ĝi estis farita el 100,000 kilogramoj da bronzo kaj 270 kilogramoj da oro, en kvar jaroj. Ĝi estas kolosa statuo malofta en la mondo.

Oriente de la Halo de Qamba sin trovas sinsekvo da grandaj kaj malgrandaj sutro-legaj haloj, el kiuj la plej granda povas enteni pli ol 2,000 homojn. En ĉiuj sutro-legaj haloj estas freskoj pri mito kaj multaj idoloj faritaj el argilo, ligno aŭ bronzo. En kelkaj budhajn haloj mi vidis porcelanaĵojn el Tang-dinastio, pli ol 3,000 malgrandajn bronzaĵojn budhajn statuojn alportitajn de Princino Wencheng kaj multajn orajn kaj jadaĵojn stampilojn donacitajn de imperiestroj de Ming- kaj Qing-dinastioj al Bainqen-lamaoj. Tie ankaŭ konserviĝas domo, en kiu interkonsiliĝadis Bainqen-lamao kaj la Qing-dinastia delegito al Tibeto siatempe.



Parto de la statuo de Qamba

En alia budha halo pendas surmure portreto de imperiestro Qianlong kaj sub ĝi estis metita la memortabuleto de imperiestro Daoguang. Qamba Chilai diris, ke Bainqen-lamao, la reganto de okcidenta Tibeto instalita de la imperiestro, pilgrimadis tiun lokon en la 15-a de la unua monato kaj la 15-a de la kvina monato ĉiujare laŭ la tibeta kalendaro por esprimi sian dankon.

Malantaŭ tiuj sutro-legaj haloj estis la loĝdomo, Sutrolega Halo kaj Relikva Stupao de Bainqen-lamaoj. Mi iris en la halon de la Relikva Stupao por Bainqen-lamao la Kvara. La stupao, alta je 11.4 metroj, konsistas el soklo, korpo kaj supro. En la korpo estis lokita la korpo de Bainqen-lamao la Kvara. La stupao estas farita el 110 kilogramoj da oro, 1,350 kilogramoj da arĝento kaj 39,000 kilogramoj da bronzo. Post riparo nun ĝi aspektas pli pompa.

KIAM vi enverŝas klaran nektaron en vinpokalon, tuj en ĝi aperas blua drako kaj facile naĝadas. Tio ne povas ne mirigi vin. Tia pokalo estas farita de la fama Jiangdu-gubernia Fabriko de Metalaj Metiartaĵoj, Jiangsu-provinco.

Lastatempe mi vizitis la fabrikon. Enirinte la eksponan ĉambron, mi tuj estis ravita de diversaj metalaj metiartaĵoj, inter kiuj troviĝas kopioj de antikvaĵoj, birdoj kaj bestoj en vivaj pozoj kaj delikataj vivbezonaĵoj iloj.

La plej alloga por mi estis orumita vintrinkilaro kun desegno de 9 drakoj. Ĝi konsistas el dek malgrandaj pokaloj, unu vinkruĉo kaj unu pleto. Ĉiu pokalo kun du drakformaj oreloj kiel teniloj altas je 5.5 cm. kaj la diametro de ĝia buŝo longas je 5.7 cm. Sur ĉiu pokalo estas ĉizitaj 6 oraj drakoj en malsamaj pozoj kaj ankaŭ sur ĝia fundo kuŝas drako. Por fari tiun kompletan da metiartaĵoj la metiistoj faris grandan klopodadon kaj montris altan saĝon. La teknologio por videbligo de la drako sukcesis nur post cent provoj. La trinkilaro estis eksponita en Japanio kaj Xianggang (Hongkong), kaj la vizitantoj ĉiuj laŭdis, ke ĝi estas trezora vintrinkilaro. Nun tia metiartaĵo estas aĉetebla ankaŭ por eksterlandanoj.

Poste mi venis antaŭ la modelon de tertrema montrilo kaj estis forte interesita de ĝi. La modelo estas farita imite al la tertrema montrilo kreita de la ĉina granda sciencisto Zhang Heng de la Orienta Han-dinastio en la jaro 132 p.K. Ĝi, inkrustita per oro, arĝento kaj juveloj, havas sur si ok orajn drakojn respektive vicigi-

Metalaj Metiartaĵoj de Jiangdu

de LI HOUYAO


tajn al ok direktoj, kaj ĉiu drako tenas globeton en sia buŝo sin direktanta malsupren al larĝe malfermita buŝo de rano sidanta sur plato. Kiam oni ekpremas rubenan butonon sub soklo de unu el la ranoj, la globeto falas el la buŝo de la supra drako en la buŝon de la rano, eligante agrablan melodion. Por fari tian grandan metiartaĵon, oni postulis, ke la drakoj ne nur impresu per relieffeco, sed ankaŭ mem faligu la globeton el kaj revenigu ĝin al sia buŝo kun muziko. Por tio estas bezonata transmisia meĥanismo. Ĉar en la tempo de Zhang Heng ankoraŭ ne estis elektro kaj horloĝo, tial al ĝi oni povas instali nek elektran aparaton nek risorton de horloĝo. Por solvi tiun teknikan problemon, la metiistoj konsultis koncernajn antikvajn materialojn kaj vizitis la urbojn Beijing kaj Shanghai por lerni de kolegoj. Post ripetada projektado kaj provado oni fine kreis tiun teknologion. La metiartaĵo estis eksponita en Beijing, Xianggang, Kuvajto kaj Japanio kaj havis grandan debiton.


La ora arĝenta metiartaĵo Ĉielgloba Modelo* estas rigardata de fremdlandaj gastoj kiel valorega trezoro. Tiu modelo prezentas la sferan universon. Ĝi konsistas el du globoj unu

Tertrema montrilo (imitaĵo)

Ĉielgloba Modelo (imitaĵo de Han-dinastia aparato)

Naŭdrakaj pokaloj





en la alia. La ekstera povas turniĝi kaj estas inkrustita per diamantoj kaj juveloj, kiuj signas konstelaciojn trovitajn siatempe de Zhang Heng; kaj la interna ne moviĝas kaj portas diamantojn, kiuj signas sennomajn konstelaciojn. La modelo estas ĉirkaŭata de kvar oraj drakoj kaj sub ĝi estas cilindro sidanta sur la dorso de testudo kaj ĉirkaŭe kvar bluaj drakoj, kiuj reprezentas la kvar direktojn — sudorienton, nordorienton, sudokcidenton kaj nordokcidenton. La viglaj teniĝoj de la subaj kvar drakoj respondas al tiuj de la supraj. La modelo sin turnas de oriente okcidenten kiel la ĉiela sfero, kaj samtempe eligas delikatan muzikon de antikva kordinstrumento.

Respondeculo de la fabriko diris, ke ankaŭ ĝiaj ordinaraĵoj kaj premiaj pokaloj kun apartaj karakterizaĵoj estas bone akceptataj en kaj ekster la lando.

En laborejo mi vidis laboristojn fari tablolampon titolitan per "Chang-e Flugas al la Luno" laŭ ĉina antikva mito. Ĝi altas je 36 cm. Ĝia ĉefa parto konsistas el la luno, feino Chang-e kaj nuba soklo. La luno el jado enhavas kavon, en kiu instaligis lampeto. Sur ĝi staras belaj

konstruaĵoj duon-reliefaj kaj koloraj nuboj delikate ĉizitaj el arĝento, kiuj prezentas pejzaĝon de la "luna palaco". Sub ĝi estas la fluganta feino Chang-e. Ŝia kapo estas gravurita el eburo kaj zorgeme kolorigita, ŝia korpo el arĝento kaj la manoj el eburo. Ŝi portas delikate plektitan palacan lanternon en la dekstra mano kaj sub ŝiaj piedoj estas nubo, montoj, pinoj, cipresoj kaj belaj konstruaĵoj el arĝento. Krome ŝin sekvas jada leporo. La soklo en formo de nuboj estas gravurita el palisandro kaj portas pilojn interne. Sur la dorso de la soklo estas malgranda ŝaltilo. Se oni ekpremas ĝin, la luno povas eligi laktoblankajn radiojn, kiuj lumigas al Chang-e la vojon al la luno en nokto.



La arĝentaj premiaj pokaloj orumitaj kaj inkrustitaj per diversaj juveloj estas faritaj de tiu fabriko imite al la kutime uzataj internaciaj pokaloj sed kun ĉinaj naciaj karakterizaĵoj. La du oreloj de la pokaloj estas en la formo de du antikvaj fiŝkapoj, kaj interne de ĉiu pokalo troviĝas bela vejnojada cilindro kun arĝenta skatoleto por konservi valoran objekton.

En la lastaj jaroj la fabriko ankaŭ akceptis mendojn de Usono, Japanio, FR Germanio, Kuvaĵto, Aŭstralio, Sirio, Nederlando kaj aliaj landoj kaj faris por ili pli ol 20 metiartaĵojn inkluzive de velŝipo, krabo, papilio, libelo, salikoko kaj fiŝo.

* La astronomia instrumento Cielgloba Modelo estis kreita de la fama astronomo Zhang Heng (78-139 p.K.) de la Orienta Han-dinastio por precize indiki la poziciojn de trovitaj steloj.

Tablolampo "Chang-e Flugas al la Luno"

Premia pokalo en formo de kiosko



Vizito al la loĝkvartalo Wulaocun



WULAOCUN estas ordinara loĝkvartalo en la urbo Nanjing (Nankino). Ĝi ampleksas ok loĝkvartalajn komitatojn, kun 4,000 familioj. Unusemajna vizito al tiu loko bone impresis min.

MALSAMAJ ASPEKTOJ

En la pajlaj kabanaj de la malnova Wulaocun loĝis malriĉaj popolanoj, kiel rikiŝistoj, triciklistoj kaj kolportistoj. Tiu loko distancis de la tiama palaco de kuomintanga prezidanto je nur 250 metroj. 3 kvaronoj de la loko estis plenaj de fetoraj fosajoj. Somere moskitoj kaj muŝoj svarmis kaj malsanoj cirkulis, kio forrabis la vivon de tre tre multaj homoj. En tiu tempo oni nomis ĝin "ĉagrena loĝkvartalo".

En la hodiaŭa Wulaocun konstruiĝis etaĝdomoj, kaj la ebena asfaltita strato estas tre pura, ambaŭflanke borderita per ombraj foliriĉaj uruŝioj. Dank' al bona sanprotekta laboro, malaperis tie kokluŝo, skarlatino, poliomyelito, encefalito B, tifo kaj aliaj kontaĝaj malsanoj.

Infanoj de la hodiaŭa Wulaocun



Ankaŭ malpliigis jaron post jaro oftaj kaj ripe-temaj malsanoj. La nivelo de la sano de la popolo ĝenerale pli boniĝis.

TENADI LA GLORAN TITOLON "HIGIEN-MODELA LOĜKVARTALO"

*Ja brile pura estas ĉio,
aromas floroj kaj l' aero.
Sub gvido de la Kompartio,
kreiĝu jam Eden' sur tero!*

La supraj versoj estis verkitaj de la fama maljuna poeto Ye Shengtao en la jaro 1965, kiam li vizitis Wulaocun. Jes! La loĝantoj de Wulaocun sukcese konstruis, per siaj manoj, sian belan hejmlokon sur la malnova loko.

En 1952, nelonge post la fonda de la popola respubliko, por plibonigi siajn loĝkondiĉojn, la loĝantoj de Wulaocun, ĉu plenkreskuloj ĉu infanoj kune forportis, sub la gvido de la popola registaro, pli ol 1,000 tunojn da rubo amasigitajn dum longaj jaroj kaj plenigis la fosajojn kaj malpurajn lagetojn, tiel ke la 5,000-metra ebena strato prezentigis antaŭ la okuloj de la homoj. La popola registaro ankaŭ konstruigis, por la loĝantoj, vicojn kaj vicojn da novaj brikdomoj. En la jaro 1958 estis konstruitaj sinsekve kvar 5-etaĝaj domoj, kaj lastjare konstruiĝis du novaj etaĝaj loĝdomoj. Por verdigi la loĝkvartalon, oni plantis arbojn ambaŭflanke de la stratoj kaj stratetoj, apud domoj kaj en kortoj. La loĝantoj de Wulaocun ĉiuj atentis pri pureco kaj publika higieno. La specialaj komisiitoj zorgas pri purigado de publikaj lokoj kaj necesejoj en la loĝkvartalo. Tie sur la tero apenaŭ videblas arbo-folioj, frukto-ŝeloj kaj ĵetitaj paperpecoj. Ĉiun sabaton Wulaocun fariĝas movplena: Ĉie troviĝas homamasoj farantaj purigadon. Tuj post kiam la laboristoj, kadroj kaj lernantoj finis sian laboron aŭ lernadon, ili ĉiuj hastas tien por purigado sen alies urĝado. Tio ja estas ilia kutimo de multaj jaroj. La loĝantoj persistas en regula purigo de sia hejmo: iom purigi ĉiutage kaj plene purigi ĉiusemajne. Sur la pordo de plejparto de la loĝdomoj algluiĝis etiketo kun ruĝe skribitaj vortoj "pura familio". Jam en 1952 Wulaocun sendis sian reprezentanton al la tutlanda konferenco pri higiena laboro, en kiu

ĝi estis elektita kiel unu el la higien-modelaj kolektivoj de la lando.

Krome Wulaocun ankaŭ havas rimarkindan sukceson en medicina servo. En 1971 ĝi establis kuracan servon, kiu donas medicinan helpon al ĉiu ordinara loĝanto, kiu ne ĝuas senpagan kuracadon de labor-asekuro, aŭ al ĉiu, kiu laboras en kolektiva fabriko aŭ vendejo en la kvartalo. Ĉe la komenco ĉiu devas pagi 0.4 juanon ĉiumonate kaj poste nur kelkajn cendojn por ĉiufoja medicina helpo; la senparencaj maljunuloj ĝuas senpagan kuracadon. En tiu servo nun laboras ses medicinistoj, kiuj aplikas la tradician ĉinan kaj okcidentan medicinon en kombino, mem kolektas drogherbojn kaj faras el ili kuracilojn, kaj faradas operaciojn sub akupunktura anestezo. Kelktempe ili preparas, por la amasoj, dekoktaĵojn el drogherboj por preventi infektajn malsanojn. Dum multaj jaroj ili persiste sendis medikamenton kaj donis kuracon al la ne-irpovaj malsanuloj en iliaj domoj. Post atako de apopleksio, la buŝo de la pli-ol-60-jara Cui Jinxiu oblikviĝis kaj ne povis paroli klare. Informiĝinte pri tio, kuracisto Xia de la servo rapidis al ŝia hejmo por kuraci ŝin. Poste la kuracisto aplikis al ŝi akupunkturon en ĉiu dua tago. Ok monatojn poste, la maljunulino tute resaniĝis. Ŝi diris emocie: "La nuna Wulaocun vere povas esti nomata Gaja Loĝkvartalo."

LA FAMILIO DE ORDINARA LABORISTO

En Wulaocun mi vizitis preskaŭ dek familiojn de laboristoj, kadroj, instruisto, intelektulo, militisto kaj senparenca maljunulino. Tiuj familioj havas, laŭ mia takso, ne tre altan vivnivelon, tamen, ĝenerale, vivas trankvile kaj komforte. La maljunulino Wang Dehua havas nun aĝon de pli ol 60 jaroj, sed aspektas kiel kvindekjarulino. Ŝi antaŭe estis laboristino de presejo. Post kiam ŝi emeritiĝis, ŝi komencis servi al la amasoj en la loĝkvartalo. Ŝi entuziasme invitis min gasti ĉe ŝi. Ŝia familio konsistas el kvar anoj kaj vivas en apartamento de pli ol 40 kvadrataj metroj kun du dormoĉambroj, gastoĉambreto, necesejo kaj balkono. La maljunulino kondukis min en la belan dormoĉambron de ŝia filo. Ŝi diris ridante: "Ĝi ankoraŭ povas esti rigardata kiel geedziĝa ĉambro, ĉar mia filo ĵus edziĝis en

majo." Mi ĉirkaŭrigardis la ĉambron kaj vidis spegulŝrankon, sofojn, librobretaron, radioricevilon, akvarion kaj ktp. Ĉio estis tiel bonorda, brile pura kaj eleganta, kaj la floroj en la potoj aromis ebriige. "Kiom da filoj vi havas?" mi demandis. Ne tuj venis respondo. Ĉagreno ombris ŝian vizaĝon. Mi informiĝis poste, ke ŝi fariĝis, en sia 7-jara aĝo, infano-fianĉino kaj edziniĝis, kiam ŝi atingis la aĝon de 14 jaroj. Poste ŝia edzo mortis pro ftizo; malsato kaj malsano forrabis la etan vivon de ŝia sola infano. Poste ŝi, senhelpa mizerulino, edziniĝis al Tong Chuande, kiu ankaŭ estis en malfaciloj. Ŝia edzo laboris kiel rikiŝisto kaj ŝi kiel kudristino kaj lavistino. Poste ŝi naskis aliajn du infanojn, el kiuj unu mortis pro infekta malsano. En la malnova socio malfeliĉoj kaj suferoj ĉiam akompanis tiun mizerulinon. Ŝi ofte diris kun ĝemo, ke ŝia sorto estas malfavora.

Tamen venis la fino de ŝia mizero. Post la Liberiĝo la maljunulino Wang fariĝis kvazaŭ alia homo. Ŝi ĉiam havas ridmienon kaj estas plena de espero pri la vivo. Ekde 1951 ŝi laboris en iu presejo dum preskaŭ 20 jaroj. En la ĝenerala korpoekzameno en 1971, oni rimarkis, ke ŝin trafis utera tumor. La fabriko sendis ŝin en hospitalon, kaj la tumor estis fortranĉita. Dank' al bona kuracado kaj zorga flegado, ŝi rapide resaniĝis. "Socialismo donis al mi la duan vivon," ofte ŝi tiel diris.

Kiam mi finis mian viziton kaj estis forlasanta Wulaocun, ĝi estis jam iluminita de miloj da lampoj. Mi returnis mian rigardon al la lumoj el la fenestroj de tiuj feliĉaj familioj, kaj tiam la amindaj ridantaj vizaĝoj de la vizititaj loĝantoj klare reaperis en mia kapo.

La medicina laboranto de la kvartala kuracejo ofte vizitas la loĝantojn malsaniĝintajn por doni ĝustatempan helpon.





Rakonto pri transloĝiĝo

Ilustris LIU RUYANG



SUR la Tibeta Altebenajo de nia lando sin trovas Lyeimei-popolkomunumo. Ĝi famiĝis tra la tuta lando pro rapida disvolvo de sia tritika kaj sekala produktado kaj altigo de la viv-nivelo de siaj popolanoj.

Rinzin Wanggyai, respondeculo de la popolkomunumo, estas profunde amata de la komunumanoj. En ĉarma printempo sur la altebenajo ĉijare, mi triafoje vizitis Rinzin Wanggyai. Ĉiufoje, kiam mi vizitis lin, mi trovis, ke li translokiĝis. Kaj pri ĉiu el liaj transloĝiĝoj estis kortuŝa rakonto.

Mia unua vizito okazis en oktobro de 1972. Tiam lia tuta familio loĝis en terkabano. Komence, mi pensis, ke ili devis loĝi tie pro sia nemulta enspezo nelonge post la fondiĝo de la popolkomunumo, sed fakte ne tiel estis.

En la demokratia reformo en 1959, li ricevis kompare bonan etaĝdomon. Tamen, por solvi malfacilon de la liberigita servutulo Zhaxi loĝanta en montaro, li diris al sia edzino: "Kiel kadro, mi devas zorgi unue la komunumanojn, do ni cedu tiun ĉi etaĝdomon al Zhaxi!" Kaj sekve, li transloĝiĝis en malnovan domon. Poste li riparigis ĝin kaj alkonstruis al ĝi malgrandan korton per sia ŝparmono de pli ol

500 juanoj. Du jarojn poste li trovis, ke la loĝejo de Dawa Zhoma ne havas sufiĉan lokon por ŝiaj multiĝintaj familianoj, kaj maltrankviliĝis pro tio. Li denove interkonsiliĝis kun sia edzino kaj decidis intersanĝi la loĝejojn kun Dawa Zhoma. La lasta neniel konsentis pri tio kaj poste pro lia sincereco ŝi proponis ke ŝi pagu la riparkoston por kompenso. Tamen Rinzin Wanggyai diris: "Onklino, en la malnova Tibeto, mi, servutulo, vivis kune kun ŝafaro ekde mia infaneco, kaj eĉ kampadis sub la ĉielo dum plenumo de deviga servo sur stepo. Miaj piedoj kripliĝis pro frostoj. Ĉu tiam mi povus havi propran domon! Hodiaŭ, mi, liberigita servutulo, loĝas en vasta domo, ĉu mi povas toleri, ke klasaj fratoj ĉagrenu pro manko de konvena loĝejo?" Vidante, ke ŝi estas ankoraŭ hezitanta, li diris al ŝi: "Ne maltrankviliĝu! Via domo estas sufiĉe vasta por loĝado de nia familio kun nemultaj membroj."

Kun larmoj ŝi transloĝiĝis en lian malgrandan korton. Post kelkaj jaroj, plimultiĝis la membroj de la familio de Rinzin Wanggyai, kaj la komunumo konstruis novajn domojn unu post alia, sed li ankoraŭ loĝis en sia malgranda domo kiel antaŭe.

En aprilo de 1976, kiam mi ankoraŭfoje vizitis lin, oni diris, ke li transloĝiĝis en alian loĝejon, kiu estis rekonstruita el ŝafstalo.

Tio okazis pro postĝinteco de la tria produkta taĉmento en produktado. Rinzin Wanggyai proponis al la komunumo ke li translokiĝu de la dua brigado al la tria. Tiutempe la dua produkta taĉmento estis la plej multe enspeza el ĉiuj taĉmentoj de la komunumo, dum la tria estis tre malmulte enspeza kaj samtempe ne havis liberajn ĉambrojn. Post lia transloĝiĝo kadroj kaj komunumanoj de la tria taĉmento volis konstrui por li novan domon, sed li danke rifuzis tion. Lia edzino ne bone komprenis lian decidon pri la transloĝiĝo kaj iom malkontentis. Rinzin Wanggyai diris al ŝi: "La antaŭa transloĝiĝo favoris al nur unu familio, sed ĉifoja celas helpi pli multe da liberigitaj servutuloj sekvi la socialisman vojon."

Tiel li venis al la tria taĉmento. Li ĉiam donis bonan ekzemplon en fizika laborado

escepte de la tempo por publika servo ekster la taĉmento. Lia edzino neniam postulis pro tio, ke ŝi estas familiano de kadro, specialajn zorgojn aŭ plendis al aliaj pri malfaciloj. Sed male, ŝi iris al laborado plej frue kaj hejmen revenis plej malfrue. En la tuta jaro ŝi laboris je 340-350 tagoj kaj fariĝis modela komunumano.

Helpate kaj influate de Rinzin Wanggyai, en la tria taĉmento aperis nova fizionomio. Ekz. taĉmentestro Gaisang Doje malsukcesis en balotado pro sia neaktiva laborado. Rinzin Wanggyai multfoje interparolis kun li por lin helpi, kaj edukite de la modelaj agoj de li kaj liaj familianoj, Gaisang Doje progresis kaj estis denove elektita kiel taĉmentestro kaj fariĝis elstara kadro. Post pena klopodado de la komunumanoj kaj kadroj de la tria taĉmento dum 4-5 jaroj, la produktado de tiu taĉmento disvolviĝis en sinsekvaj jaroj kaj ĝia produktokvanto de greno estis la plej granda, ĝia brutaro kreskis plej rapide kaj la enspezo de ĝiaj komunumanoj estis la plej multa en la komunumo. La meznombra grenporcio por ĉiu el ĝiaj membroj pliiĝis je ĉ. 100 kg. kaj atingis 300 kg. Multaj komunumanoj enloĝiĝis en novajn domojn, kaj Rinzin Wanggyai rekonstruis sian loĝejon.

Ĝuste post la pliboniĝo de sia loĝejo, en aŭgusto pasintjare, li postulis transloĝiĝi al la unua taĉmento, kies agroj kuŝantaj plejparte sur riverbordo estis fekundaj, sed la totala produktokvanto de greno, la porcio de greno, viando, oleo kaj lano por ĉiu loĝanto kaj la pago por labortago estis la plej malaltaj en la tuta komunumo. La kaŭzo kuŝis ĉefe en tio, ke al la kadroj de la taĉmento mankis ambicio por plibonigi la produktadon. Informiĝinte pri la intenco de Rinzin Wanggyai translokiĝi al la unua taĉmento, la kadroj kaj komunumanoj de la tria taĉmento venis amase al lia domo. Ili diris: "Se vi maltrankviliĝas pro la malmulta enspezo de la unua taĉmento, do la partia filio venigu dek, eĉ dudek el ĝiaj familioj al nia taĉmento, sed vi neniel devas foriri." Li estis tre kortuŝita kaj diris: "Ĉiuj membroj de la komunumo, kiel galopantaj ĉevaloj, kuras sur la socialisma vojo. Se nur la fortaj ĉevaloj kurus antaŭen, dum la malfortaj postigus, ĉu la tuta

ĉevalaro povus rapide atingi la celokon?" La kadroj kaj komunumanoj estis konvinkitaj. Kiam li estis forlasanta la taĉmenton, la komunumanoj regalis lin per sekalvino kaj buterteo.

Post kiam li venis al la unua taĉmento, li faris mobilizadon al la kadroj kaj komunumanoj, kaj samtempe aktive partoprenis en la produkta laboro, kio akcelis aktivecon de la komunumanoj en la produktado.

Vizitante la unuan taĉmenton, mi aŭdis bruadon de maŝinoj apud la rivero Lhunze kaj vidis, ke ĉie regis vigleco kaj viveco. Li gvidis min pririgardi konstruatajn loĝejojn kun larĝa dormoĉambro, kuirejo, konservejo kaj balkono. Li diris, montrante la placon antaŭ la domo: "Fininte la konstruadon de la loĝdomoj, ni konstruos tie konservejon por brulligno kaj stalojn por porkoj kaj bovoj, kaj ankaŭ plantos fruktarbojn. La komunumanoj baldaŭ povos transloĝiĝi en belajn kaj purajn domojn."

Tamen li mem ankoraŭ loĝas en malnova domo iom riparita. En la Dekunua Kongreso de la Partio okazigita en 1977, li estis elektita kiel alterna membro de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Li diris al mi, ke por elvolvi la bonajn tradiciojn kaj laborstilojn de la Partio, li decidis pene fari produktadon kune kun la amasoj kaj loĝi en tiu domo ankoraŭ du-tri jarojn.



Kiom da infanoj ŝi havas

Ilustris CHEN YUXIAN

(Daŭrigo)

V

NUN, la pli-ol-70-jara Lin Qiaozhi laboras ankoraŭ pli diligente. Ŝi nek faris mirindan inventon, nek verkis dikan libron. La laboro de la ginekologia-obstetrika sekcio estas banala kaj peza. De peniga laborado en tagoj kaj noktoj neĝe blankiĝis ŝiaj haroj. Ŝi verŝis sian vivon en tiun de aliaj kaj ŝia verko estas ĝuste la resanigitaj virinoj kaj infanoj.

Laŭ la tradicia konsidero de la medicinaj rondoj, eble ŝia faro estas ne mirindaĵo. Tamen per sia kutima persistemo ŝi vere kreis serion da mirindaj rekordoj.

Ŝi neniam ripozis en dimanĉo. Eĉ en la festotagoj de la Unua de Majo, la Nacia Festotago kaj la Novjara Tago, ŝi kutime iras al la hospitalo por pririgardi pacientojn. Konsiderante pri ŝia grandaĝeco, oni admonis, ke ŝi ripozu hejme en la ferioj, sed ŝi diris: "Mi ne povas al kutimiĝi al restado en la hejmo, se mi restus nenion farante dum tuta tago, mi sentus min kvazaŭ bebo sen lakto. . ."

Ŝi neniam havis bonan dormon. Ŝi havas telefonon ĉe sia lito. Oni ofte raportas al ŝi malfacilajn kazojn en la hospitalo, kaj pro tio ŝi devis iam atendadi informojn ĉe la telefono dum la tuta nokto. Por ne ĝeni ŝin en ripozo, iuj noktaj deĵorantaj kuracistoj ne faris raporton al ŝi, kaj ŝi ilin riproĉis en la sekvanta tago: "Sen via telefona raporto, estis ankoraŭ pli malfacile por mi endormiĝi!"

Sekve de ŝia maljuniĝo, iuj malsanoj trafis ŝin. Sed ricevinte injekton en supra etaĝo, ŝi tuj descendis viglapaŝe por komenci sian tagan laboron en la teretaĝo. Ŝajnis al ŝiaj kolegoj, ke ŝi neniam malsaniĝis. . .

Dum dekoj da jaroj, ŝi ĉiam tiel laboradis. Kiel mirindan persistemon ŝi havas! Sed ŝi pensas, ke ĉio tio estas tute natura, tute nemenciinda. Ŝi rigardas la ginekologian-obstetrikan fakon kiel sian veran hejmon, tial ŝiaj kolegoj nomas ŝin "maljuna familiestrino". Fakte ŝia koncepto pri hejmo estas plivastiĝanta, ŝi jam rigardas la tutan socion kiel sian hejmon.

Sub la prizorgado de prezidanto Mao Zedong kaj ĉefministro Zhou Enlai, la sanprotekta afero de nia lando ricevis grandan disvolviĝon en la kvindekaj jaroj. Laboroj monte amasiĝis antaŭ Lin Qiaozhi kaj ĉiutage ŝi estis plene okupata. Krom kuracado kaj akuŝigo, ŝi devis propagandi pri naskolimigo, doni medicinan helpon al fremdlandaj pacientoj, solvi ĉiutagajn provizajn problemojn en la hospitalo, prizorgi la laboron de flegistinoj, respondi multajn leterojn, prepari por fondo de la unua ginekologia-obstetrika instituto de Ĉinio, ĉeesti diversajn kunvenojn. . . Kun granda energio kaj vigleco ŝi antaŭen puŝadis la ginekologian-obstetrikan aferon de la tuta lando. Verdire, ŝia laboro delonge jam transpasis la limon de tiu de specialisto kaj instruitulo, ŝi fariĝis eminenta socia aktivulo kaj reprezentanto de miloj kaj miloj da patrinoj kaj infanoj.

Pro ŝia kontribuo, la Partio kaj la popolo donis al ŝi meritatan honoron kaj ŝi estis elektita kiel popola reprezentanto kaj membro de la Konstanta Komitato de ĉiufoja Tutlanda Popola Kongreso.

Ŝi estas ĉie respektata kaj multaj konas ŝin. La arĝentaj haroj kaj viglaj korpomovoj aparte ŝin karakterizas. Kiam ŝi iras surstrate, ofte iuj infanoj aliras al ŝi kaj riverencas al ŝi kun saluta voko "avinjo Lin". Kiam ŝi eniras aŭto-



buson, iuj virinoj tuj cedas al ŝi sian sidlokon. Kiam ŝi vizitas magazenon, komizinoj ne lasas ŝin atendi en vico.

Preskaŭ kun timemo ŝi akceptas la respekton kaj konfidon de la aliaj. Ŝi ĉiam rigardas sin kiel ordinaran virinon kaj rifuzas apartan favoron.

Kiam ŝi revenis al sia kabineto post kiam ŝi estis unuafoje elektita kiel membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, ŝi diris al sia helpanto: “Kial elekti min kiel membron de la Konstanta Komitato? Ĉu mi meritas la honoron? Mi vere maltrankvilas pro tio. Eble pro tio, ke virinoj devas esti en la komitato kaj estas malfacile trovi konvenajn virinojn, sekve oni elektis min. . .”

Foje, ĉefministro Zhou volis ke ŝi akceptu fremdlandajn gastojn, kaj ŝi diris al sia helpanto kun maltrankvila koro: “Kial oni volas, ke mi akceptu fremdlandajn gastojn? Kion mi povus fari? . . . Ho jes! La ĉefministro tre bone konas min kaj scias, ke mi nenion scipovas, tial aparte donas al mi ŝancon, por ke mi lernu. . .”

Kvankam jam blankiĝis ŝiaj haroj, ŝi tamen ĉiam sentas sin infaneca kaj devas multon lerni. Ŝia modesteco ne estas ŝajnigita. Kun infana sincereco ŝi rigardas ĉion, inkluzive de la demando de aliĝo al la Kompartio.

Foje, la antaŭe menciita junulo kun malmiopaj okulvitroj, korverse interparolis kun ŝi en ŝia kvieta kabineto: “Doktorino Lin, ĉu vi iam pripensis pri via aliĝo al la Kompartio?”

Ŝi volis aliĝi al la Partio, tamen ne kuraĝis pensi pri tio, kaj tiel ŝi ekscitiĝis je la demando, ke ŝi ne sciis kion diri: “Ho, mi ja ne taŭgas! Vi ja konas min, mi ankoraŭ ne maturiĝis ideo-

logie, kaj mi kredas, ke por vivi home necesas subteno de spirita forto. Oni diras, ke tio estas ideisma penso. Kiel ideisto povas fariĝi kompartiano. . .” La junulo ektuŝis siajn okulvitrojn, silentis momenton kaj ne daŭrigis la interparolon. Li misdivenis, ke la spirita forto menciita de Lin signifas kredon je Dio. Kaj tiu demando restis poste ne plu tuŝata.

Sed kio estas la spirita forto? Mem la specialistino pri ginekologio-obstetiko, kiu bone konas la sekreton de la vivo, havas nur nebulan ideon pri tio kaj ne povas bone klarigi.

Do ŝi mem esploradu plue. . .

VI

Ŝi jam longe ne vidis ĉefministron Zhou. Antaŭ la jaro 1966 ŝi ofte intervidiĝis kun li kaj

fratino Deng. Ĉefministro Zhou multe zorgis pri la virinoj kaj infanoj, kaj ĉiujare donis pli ol dek aŭdiencojn al reprezentantoj de virinoj kaj higienaj laborantoj. Ĝuste en la persono de la ĉefministro ŝi vidis la grandecon de la Komunista Partio kaj trovis la definitivitan celon de sia afero. Ŝia sopiro al ĉefministro Zhou estis senfina kaj klara kiel fluo de rivero.

Iudimanĉe en la jaro 1971, ŝi ricevis telefonan sciigon, ke ŝi kaj Zhang Xiaoqian, estro de la fako de internaj malsanoj, kune ĉeestu iun konferencon.

Post la komenco de la kultura revolucio, ŝi tre malofte eliris por ĉeesti kunvenon, tial ŝi estis iom mirigita. Alveninte la kunvenejon ŝi informiĝis, ke oni diskutas tie pri kombino de la ĉina kaj okcidenta medicinoj. Ankaŭ la estimata ĉefministro Zhou venis por ĉeesti la kunvenon. Forte batadis ŝia koro, kiel ŝi deziris iri al la ĉefministro kaj interŝanĝi kun li kelkajn vortojn.

Dum irado de la kunveno, ĉefministro Zhou ĉirkaŭrigardis kaj subite demandis per laŭtigita voĉo: “Ĉu Lin Qiaozhi venis? Mi mem invitis ŝin. . .”

“Jen mi!” Ŝi stariĝis kun ekscitiĝo.

La ĉefministro ĵetis rigardon al ŝia arĝenta hararo kaj diris ridetante: “Ho, mi jam devas nomi vin estimata maljuna Lin. . . Bonvolu diri al mi, kiel oni traktas eksteruteran gravediĝon en via hospitalo?”

Je mencio pri kuracado, ŝi iom trankviliĝis kaj respondis: “Plej ofte per operacio.”

La ĉefministro diris: “Vi lernu de ĉinmedicinaj kuracistoj, ĉu bone?”

“Bone,” ŝi kapjesis.

La ĉefministro sin turnis al ĉiuj kaj diris laŭte: “Ĉu vi ĉiuj aŭdis? Ŝi diris ‘bone!’”

La serenaj kaj spritaj vortoj de ĉefministro Zhou vekis ridojn ĉe la ĉeestantaj medicinaj laborantoj. . .

Reveninte hejmen post la fino de la kunveno, ŝi tuj informis aliajn pri tiu mallonga interparolo; ŝi havis vere agrablan dimanĉon.

Je la fino de 1972, ŝi vizitis Usonon, kiel membro de la Delegacio de la Ĉina Medicina Asocio. Antaŭ la ekiro de la delegacio, ĉefministro Zhou venigis ĝiajn membrojn en la Popolan Halon je la 23-a horo kaj longe parolis al ili ĝis la 2-a horo de la sekvanta mateno. Tiam nia ĉefministro jam estis en grava malsano. Ĉiuj ĉeestantoj estis medicinaj specialistoj kaj havis la devon prizorgi malsanulojn. Tio, ke la malsana ĉefministro laboras eĉ ĝis profunda nokto, forte doloris ilian koron. Tiufoje, Lin Qiaozhi adiaŭis la ĉefministron kun larmoj.

Reveninte de sia vizito al Usono, la delegacio faris raporton al koncerna instanco. Kaptinte kelkajn vortojn pri eksterlanda medicina laboro en la raporto kiel pretekston, la respondeculo, kiu aŭskultadis kun flegma mieno, diris riproĉe: “Vi estas senditaj pririgardi fremdlandon, tamen vi admiras ĝin!”

Tamen la ĉefministro laŭdis ilian raporton. Li demandis krome: “Ĉu la raporto estas skribita de iu sola?”

“Ne, de ni ĉiuj kune,” respondis Lin Qiaozhi.

Rigardante ĉefministron Zhou kun kaviĝintaj okuloj kaj neĝblankaj haroj ĉe la tempioj, ŝi estis forte emociita. Ho, ĉefministro, vi ĉiam pensas pri la tutlanda popolo kaj plene vin dediĉas por efektiviĝi la revolucion linion de prezidanto Mao; tamen iuj ĉiam agas malamike kontraŭ vi, ili vere estas brutoj en homaj vestoj, vere frenezaj!

Ŝi entuziasme ekparolis pri politiko, per sia kutima simpla lingvo kaj diris kion ŝi pensis.

“Prezidanto Mao kaj ĉefministro Zhou estas plej bonaj! Ili estas tiaj. . .” Ŝi starigis sian dikfingron kaj forte ĝin skuis: “Ve, la ĉefministro malsaniĝis, grave malsaniĝis. La ĉefministro ja estas nemalhavebla por nia lando, mi eĉ ne kuraĝas pensi pri tio. . .”

Kiam ŝi vekigis en iu frosta mateno, ŝi aŭdis mallaŭtan funebran muzikon el radioricevilo kaj tuj konsciis, ke okazis malfeliĉo. Ŝi sentis kreviĝon de la koro kaj kapturiniĝon, ŝi ekploradis singulte. . .

Per plej pezaj paŝoj ŝi iris al la longa strato kun torentaj homamasoj, al Tian'anmen-placo dronanta en maro de blankaj floroj. Ŝi prezentis neĝblankan floretan al la bazo de la alta Monumento de Popolaj Herooj. En ŝia koro, ĉefministro Zhou estas granda persono de la epoko, ŝia bona instruisto, pliaĝa frato kaj plej bone konata intimulo. En la floreto koncentriĝis ŝia plej sankta sentimento. . .

En la malĝojaj tagoj, je hazarda okazo ŝi vidis en sia hejmo la antaŭe viditan viron kun malmiopaj okulvitroj. Forpasis jam 20 jaroj kaj li jam fariĝis severaspekta mezaĝulo. Kaj ili daŭrigis la interrompitan konversacion.

Per tremantaj manoj Lin Qiaozhi malfermis sian fotoalbumon, elprenis la zorge konservatajn fotojn pri ĉefministro Zhou kaj ilin metis unu apud alia tiel ke ili kovris la tutan tablon. Ŝi rememoris la scenojn de ŝia intervidiĝo kun ĉefministro Zhou. Ili interparolis ĝis tre malfrua horo. Lin Qiaozhi diris emocie: "Ĉu vi ankoraŭ memoras la vortojn kiujn mi diris al vi? Mi ĉiam kredas, ke por home vivi necesas spirita forto. Tio ne estas io ideisma. Fine mi trovis tiun forton, ĝi estas nia estimata ĉefministro Zhou!" Je tiuj vortoj, larmoj, similaj al perloj de rompita fadeno, ruliĝis tra ŝiaj piaj, seriozaj kaj sulkoplenaj vangoj. . .

La koro de la mezaĝa viro ekskuiĝis, li ekvidis sian antaŭan miskomprenon pri ŝi. Li pensis: Estas vere malfacile koni iun homon, des pli malfacile koni la internan mondon de malnova

intelektulo. Kaj ankaŭ estas malfacile fari scian resumon pri la pravo kaj malpravo de ŝia personeco. . .

VII

La paroladoj de prezidanto Hua Guofeng kaj vicprezidanto Deng Xiaoping en la Tutlanda Scienca Konferenco okazigita en marto de 1978 denove malfermis la koron de miloj kaj miloj da intelektuloj. La specifaj historiaj kondiĉoj de nia lando difinis la specifajn travivaĵojn de niaj intelektuloj. Ilia progreso tra zigzaga vojo estas rigardata kiel manifestiĝo de iliaj firma decido kaj sistemo; iliaj akraj pensoj kaj vortoj estas rigardataj kiel manifestiĝo de sincereco kaj honesteco; ilia diligenta kaj penema laboro ricevis meritatan respekton. Dank' al la edukado de la Partio, multaj el ili jam tute aliĝis. La granda proletaro ilin ĉirkaŭprenis kaj edukis per sia tuta koro.

Dum sia tuta vivo, doktorino Lin Qiaozhi, ginekologia-obstetrika laboranto, sin okupas pri akceptado kaj protektado de homa vivo kaj akiris grandajn sukcesojn. Ŝi serĉadis veron kaj esploris la profundan signifon de la vivo, dum sia vivo. Ŝia neelĉerpebla sistemo en esplorado prezentas disradiantan brilon de ŝia vivo! Kvankam ŝi mem ne fariĝis patrino, tamen ŝi ja estas meritoplena patrino de niaj amindaj infanoj. Kiom da infanoj ŝi havas? Eĉ ŝi mem ne povas klare respondi tion.

(Fino)



Revizita al Dayaoshan-monto

de FEI XIAOTONG*




ANTAŬ nelonge mi venis de-
nove al Dayaoshan-monto en
la orienta parto de la Guangxi-a
Gŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono,
kiun mi unuafoje vizitis antaŭ 43
jaroj, kiam mi estis ankoraŭ stu-
dento, por fari esploron pri naci-
malplimulto.

Same kiel en la unua vizitado al
la loko, ĉifoje mi ekiris en la mont-
regionon ĉe Tongmu en Xiang-
zhou. Ĉe la kruta deklivo en la
enirejo, kie antaŭe estis nur kelkaj
jaŭ-familioj, nun troviĝas vilaĝo
kun kelkdek familioj. Mia akom-
pananto diris, ke en nemultaj jaroj
post mia unua vizito, tiuj jaŭ-fami-
lio estis forpelitaj de la reakcia re-
gistaro de Kuomintango en profun-
dan montaron, kaj dum la pli ol
20 jaroj de tiam ĝis la liberiĝo la
vojo je dekoj da lioj (1 lio = 0.5
kilometro) longa al la monto restis
dezerta.

Jaŭ-nacieco multe suferis en la
pasinteco. En la malnova Ĉinio,
tiu nacimalplimulto, kiu suferis
diskriminacion, estis forpelita, en
fruaĵ jaroj, al la alta kaj frosta
zono en Nanling-montaro. Dayao-
shan estis unu el la lokoj koncentre

loĝataj de jaŭ-oj. Tiu regiono kun
areo de ĉ. 2,300 kvadrataj kilome-
troj havas multajn altajn montpin-
tojn nuboskrapantajn kaj krutajn
rokmurojn. En 1935, kiam mi
unuafoje iris tien, mi devis uzi nur
miajn piedojn pro manko de ŝoseoj.
La zigzagaj vojetoj en la primitiva
arbaro de tempo al tempo malaperis
en densaj herbejoj. Pro perdo de
la vojo mi falis en foson aranĝitan
por kapti tigron kaj vundiĝis de tio.
Mia edzino, kiu sola malsupreniris
de la monto por trovi helpantojn,
perdis la vivon en torento pro mal-
atento. Kompreneble estis tiuj nat-
uraj danĝeraĵoj kiuj kaŭzis al mi
malfeliĉon, sed ĝuste helpe de ili
la jaŭ-oj povis sin defendi kaj vivi
tie de generacio al generacio.

En profunda montaro kovrata de
densaj arbaroj oni vivis tre mal-
facile. Nur sur malgrandaj ebenajoj
ĉe bordoj de kelkaj torentoj oni
povis kulturi rizon. La praaĵoj de
la jaŭoj loĝantaj en Dayaoshan
venis al la loko en malsamaj tem-
poj. La unuaj venintoj fiksloĝis
ĉe montopiedoj kaj kreis tie mal-
grandajn pecojn da ŝtuparaj kampoj
por kulturi rizon. Ili proprigis al
si montojn kaj arbarojn kaj estis
nomataj montomastroj-jaŭ-oj. La
poste-venintoj devis lui teron de
la unuaj por fari primitivan agri-
kulturon. Ĉiujare ili devis pagi al
la unuaj terrenton kaj servi al ili
senpage. Pro primitiveco en kul-
turado ili devis forlasi la teron post
kelkaj jaroj kaj iri aliloken por krei
novan kampon. Ĉar ili ne povis
fiksloĝi, ili estis nomataj migrantaj
jaŭ-oj. Dum mia unua vizitado al
la loko mi loĝis iam en bambua
kabano de migranta jaŭ-familio.
Nokte frosta vento enpenetris tra
la bambuplektita muro kaj kiel
manĝaĵon ni havis nur maizon kaj
sovaĝajn legomojn. Nur malmultaj
el la familioj havis kompletan lito-
kovrilon, kaj eĉ al plenkreskuloj
mankis vestoj.



Fei Xiaotong

En la kvardekaj jaroj, la reakcia
registaro de Kuomintango dividis la
lokon en 7 distriktojn, por ke ili
estu facile regataj respektive de 7
gubernioj. Utiligante kontraŭdirojn
inter la montomastroj-jaŭ-oj kaj mi-
grantaj jaŭ-oj, ĝi koluziis kun la
jaŭ-a feŭda bienularo kaj tiel faris
la lokon ankoraŭ pli malluma kaj
postĝinta. Nur post la fondiĝo de
la Ĉina Popola Respubliko en 1949,
la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj
la jaŭ-a popolo en kunago ekster-
mis ĉiujn restintajn banditojn de
Kuomintango, kaj la jaŭ-a popolo
ekhavis novan vivon.

Mi iom hezitis antaŭ ol mi de-
cidis fari la reviziton al Dayaoshan.
Mi timis, ke mi, preskaŭ 70-jara
maljunulo, ne povos grimpi sur
montojn. Efektive tiu timo estis
superflua, ĉar Dayaoshan tute ŝan-
ĝiĝis. Ĉifoje anstataŭ piediri mi
veturis en la montaron per aŭto-
mobilo kun marko "Shanghai" de
Nanning, la ĉefurbo de Guangxi,
rekte ĝis la Jinxiu-a Jaŭ-nacieca
Aŭtonoma Gubernio, la centro de
Dayaoshan, kiun mi ne povis atingi
antaŭ 43 jaroj. Nur ses horoj estis
bezonataj por trapasi la montvojon
de pli ol 360 kilometroj. Kom-

parante la facilan veturon kun la peniga piedirado en la pasinteco, mi sentis kvazaŭ en alia mondo.

Kiam ni atingis Jinxiu, vespera krepusko jam vualis la teron. Mi malfermis la fenestron, kaj en miajn okulojn tuj saltis lampolumoj ambaŭborde de Jinxiu-rivero kiel steloj sur la ĉielo. Ĉu tio vere estas la Dayaoshan antaŭe vizitita de mi? La mastro ŝaltis la lampon en la ĉambro kaj diris al mi: "Elektro produktita de nia hidroelektrejo superis la bezonon, nun mankas al ni sufiĉe da elektrokonsumentoj kaj tio fariĝis problemo urĝe solvenda." La nomita elektrejo produktadis jam pli ol unu jaron. Pro la supre dirita kialo kaj pro tio ke multaj produktaj brigadoj jam havas sian malgrandan elektrejon, nun funkcias nur unu el la du generatoroj en la hidroelektrejo.

Antaŭ 43 jaroj ĉi tie ja regis malumo en la ĉambroj dum nokto kaj nur flamoj en la fajrujo donis iom da lumo. Se lumo estis bezonata, oni devis bruligi pinan torĉon. Tia torĉo ellasis plaĉan odoron, tamen ĝia nigra fumo pikis la okulojn. Nun ĉiu familio havas elektran lampon, ĉiu produkta brigado povas rigardi filmojn kaj ĉiu komunumo havas televidilon.

Dayaoshan estas bona loko por forstokulturo. En la sekvanta tago mi veturis per aŭto al la forstokulturejo je 1,400 metroj super la mara nivelo. La vasta arbaro etendiĝas senlime. Subite granda fasko da arbotrunkoj falis de super mia kapo sur ligno-amason apud la ŝoseo. Oni jam uzis elektron en arbohakado. En la pasinteco, por ŝultroporti unu arbotrunkon el la montoj, multaj homoj devis iri plurajn tagojn. Sed nun anstataŭe oni uzas arganojn kaj ŝarĝaŭtojn.

Vespere mi kaj Mo Yiming, sekretario de la Partia Komitato de

la Jinxiu-a Jaŭ-nacieca Aŭtonoma Gubernio, kaj ĝia vicsekretario Li Shengping sidis ĉirkaŭ fajrujo kaj babilis pri ŝanĝiĝoj de la loko. La 54-jara Li Shengping estas ĝuang-o el najbara gubernio. Li fariĝis unu el la gvidantoj de Jinxiu jam en 1950, kiam fondiĝis la popola reĝimo. La 40-jara Mo Yiming estas jaŭ-a kadro, diplomitiĝinta en la Sud-ĉinia Naciminoritata Instituto post la Liberiĝo. Mo estas serena kaj humura, dum Li honesta kaj sincera. Ili helpas unu la alian kiel fratoj.

Ĝuste kiam ni parolis pri kresko de Jaŭ-aj kadroj, envenis membro de la antaŭa Konstanta Komitato de la Gubernia Partia Komitato. Li estas hano el nordorienta Ĉinio. Kiel membro de la Labora Grupo li estis sendita al Dayaoshan tuj post la Liberiĝo. Li interrompis nian interparolon, dirante, ke kiam li venis al la loko li tuj estis taskita kulturi 1 jaŭ-an kadron en tri jaroj por povi poste forlasi la montaron. Efektive li laboris tie pli ol dek jarojn, dum kiuj li elkulturis nemalmultajn jaŭ-ajn kadrojn. Kiam fondiĝis la Jaŭ-nacieca Aŭtonoma Gubernio, inter ĝiaj gvidantoj troviĝis nur unu jaŭ-o. Nun el la naŭ gvidantoj estas 6 jaŭ-oj, 1



Pan Meiying (dekstre), jaŭ-a sekretariino de la Gubernia Komitato de KPC, iras al kamplaboro kun komunumaninoj.

ĝuang-o kaj 2 hanoj. Parolante pri tio, ili rigardis unu la alian kun triumfa rideto.

La disvolviĝo de Dayaoshan estas nedisigebla de la helpo de aliaj naciecoj. Mi prenu la supre diritan hidroelektrejon kiel ekzemplon. Ĝi estis subvenciita de la ŝtato, ĉiuj ĝiaj ekipaĵoj estis produktitaj de Fujian-provinco, ĝia projekto farita

La aŭtoro dum vizito al jaŭ-oj



de koncernaj fakuloj de la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono kaj ĝiaj jaŭ-aj teknikistoj elkulturitaj en lernejoj de Nanning.

La fondiĝo kaj progreso de la Jinxiu-a Jaŭ-nacieca Aŭtonoma Gubernio pruvis la egalecon de la jaŭ-oj rilate al aliaj naciecoj en politiko. Tamen kiel oni nuligis la neegalecon inter la jaŭ-oj? Interesa estas la historio pri tio.

En 1951, la Centra Komitato de la Partio sendis delegacion al Dayaoshan por fari esploron pri tieaj nacimalplimulto. Ĝi informiĝis pri kontraŭdiroj inter la montomastroj-jaŭ-oj kaj migrantaj jaŭ-oj. Post interkonsiliĝo ambaŭ flankoj faris, laŭ propono de la delegacio, interkonsenton de solidareco (ĝia ĉefa enhavo temas pri nuligo de privilegioj, libera ekspluatado de virga tero kaj redukto de terrento), gravuris ĝiajn artikolojn sur ŝtonplato laŭ la jaŭ-a tradicio kaj okazigis solenan ceremonion, en kiu diversnaciecaj reprezentantoj trinkis kokan sangon por montri sian firman decidon pri observado al ĝi.

Sed la interkonsento ne abolis la feŭdan terposedantecon, tial la kontraŭdiroj inter la montomastroj-jaŭ-oj kaj migrantaj jaŭ-oj ne solviĝis radikale. En 1954 efektiviĝis la agrara reformo, kiu ĝisfunde likvidis la ekonomian bazon de kontraŭdiroj inter la jaŭ-oj. Tuj post la agrara reformo efektiviĝis kooperativigo. En la densa atmosfero de la nacia solidareco oni elmetis la sloganon "Estu bonvenaj la migrantaj jaŭ-oj, kiuj malsupreniris de montoj" kaj multaj jaŭ-oj loĝantaj sur altaj montoj transloĝiĝis al riverbordo. La montomastroj-jaŭ-oj donis al ili parton de sia agraro, kaj post klopodado dum pli ol 20 jaroj la lastaj jam vivas feliĉe kiel la aliaj jaŭ-oj.

Mi vizitis la produktan taĉmenton Fenzhan de Liula-brigado. Ĝi konsistas el pli ol 20 familioj, kiuj plejparte estas migrantaj jaŭ-oj. En 1958 ili transloĝiĝis de la profunda arbaro, el kiu fontas Jinxiu-rivero. Tiam la montomastroj-jaŭ-oj donis al ili 21 muojn (1 muo = 1/15 hektaro) da rizkampoj. Dank' al kulturebligo de virga tero nun ili jam havas pli ol 60 muojn da rizkampoj. En la komenco ĉiujare ili devis aĉeti preskaŭ 3,000 kilogramojn da greno por kontentigi sian bezonon. Nun krom disdono al ĉiu po 300 kilogramoj da greno ĉiujare, ili liveris pli ol 5,000 kilogramojn da greno al la ŝtato. Nun troviĝas en Jinxiu dekoj da novaj vilaĝoj, kiel Fenzhan, formitaj el "migrantaj" jaŭ-oj. Kompreneble la montomastroj-jaŭ-oj havas vivon pli bonan ol la "migrantaj", kaj samnivelan kun tiu de hanaĵ kaj ĝuangaj kamparanoj ekster la montaro.

Rapide disvolviĝas la industrio de Jinxiu-gubernio. Antaŭ la Liberiĝo en la profunda izolita montaroneniu aŭdis maŝinbruadon, sed nun tie jam funkcias pli ol 10 fabrikoj de agrikulturiloj, tekstilo, kemiindustrio, aŭtoriparado, paperfarado, grenprilaborado k.a. Ankaŭ evidenta progreso okazis al tiea kultura kaj eduka aferoj. En 1957 en la tuta gubernio estis nur unu mezlernejo kaj 88 elementaj lernejoj, sed en 1977 tie jam estis 327 mezaj kaj elementaj lernejoj. Antaŭ la Liberiĝo la jaŭ-oj neniam rigardis filmon, sed nun ĉiu komunumo havas kinejon kaj ĉiu brigado sian filmprojekcian grupon.

Ĉiusemajne la jaŭ-oj povas ĝui filmon. La arta trupo de la gubernio disvolvis la tradiciajn muzikon kaj dancarton de jaŭ-oj, kaj ĝiaj programeroj estis plurfoje premiitaj en tutlanda arta festivalo kaj tiu de la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono.



Jaŭ-a infano lernas ludi kordmuzikilon.

Montrante liniojn de konstruataj ŝoseoj sur mapo, sekretario Mo diris al mi kun bedaŭro, ke mi ne povas viziti, pro nefinplenumiĝo de la ŝoseokonstruado. Guchen-vilaĝon kiun mi vizitis antaŭ 43 jaroj. Fakte la sidejoj de la 7 komunumoj de la gubernio ĉiuj estas atingeblaj per aŭtoj, sed por atingi iujn el ili oni devas ĉirkaŭveturi aliajn guberniojn.

Hodiaŭ, dum la longa marŝo por modernigi la patrolandon, la relative postĝintaj jaŭ-oj neeviteble renkontos pli grandajn malfacilojn ol aliaj frataj naciecoj. Kiam mi adiaŭis kamaradon Li Shengping antaŭ la pordo de la hidroelektrajo, li diris, suprenrigardante la altpremajn akvotubojn preskaŭ vertikale starigitajn laŭ la montdeklivo: "Se vi venos denove, tiam vi vidos tute alian fizionomion, ĉar la produktokvanto de elektro de la fabriko superos dekmil kilovattojn."

** La aŭtoro estas profesoro de la Centra Nacimalplimulta Instituto, membro de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj vicedestro de la Instituto pri Nacimalplimulto de la Ĉina Socio'logia Akademio.*



LA AVINO-URŜINO

(88Es-151-P)

Tiu ĉi estas kolora bildlibro por infanoj. Ĝi rakontas, kiel saĝa kaj kuraĝa knabino Ginhua morte batalas kontraŭ pseŭdobonkora ursino.

46 koloraj bildpaĝoj 18.3 × 17.2 cm.

Prezo: £0.45 US\$0.90 FF4.20 DM2.30

Eldoninto: Fremdlingva Eldonejo, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala Distribuanto:

Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN

P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Mendu ĉe la peranto aŭ rekte ĉe la ĝenerala distribuanto!


Metiartaĵoj el arboradikoj

El la metiartaĵoj propraj al Fujian (Fugian)-provinco estas unu speco farita el naturaj arboradikoj.

Tiu speco de metiarto havas longan historion. En Ming-dinastio (1368-1644 p. K.) metiartisto Kong Mu kun eminenta arto kreis nemal-

multajn valorajn metiartaĵojn el arboradikoj.

En la montoza kaj arbaroza Fujian-provinco kreskas raraj arboj, kiaj delariko, banjano, palisandro, santalo kaj longano. Dum daŭro de longa tempo iuj radikoj de la



supre diritaj arboj restis en fundo de rivero, dum aliaj radikoj estis submetitaj al prilaboro de vento kaj pluvo por centoj da jaroj, rezulte de tio formiĝis krudaj materialoj de arboradikaj metiartaĵoj kun kuriozaj formoj de homfiguroj, birdoj kaj bestoj. Post prilaboro ili fariĝis artaĵoj.



58 DOKOJ POR PLI-OL-DEKMIL-TONELAJAJ ŜIPOJ EN STREĈA KONSTRUADO

Nun en Ĉinio iras streĉa konstruado de 58 doko por pli-ol-dekmil-tonelaj ŝipoj. Ekzemple, en la havenoj de Shanghai (Ŝanhajo), Guangzhou (Kantono), Tianjin (Tiangin), Qingdao (Kingdaŭ), Qin-

huangdao (Kinhuangdaŭ) kaj Ningbo oni konstruas universalajn kaj ĉefe specialajn dokojn por dekmil-, kvindek-mil- kaj centmil-tonelaj ŝipoj, kiuj servas por transporti karbon, nafton, ercon kaj varojn en konteneroj.

Dank' al finkonstruo de la novaj doko kaj teknika reformado al la havenoj multe kreskos la transporta kvanto de niaj havenoj.

RIĈAJ ERCO-FONTOJ DE ĈINIO

Ĉinio jam trovis riĉfontojn de pli ol 140 specoj de mineraloj kaj pruvis sin unu el la malmultaj landoj en la mondo kun sufiĉe multaj specoj de mineraloj. Ĝi jam konis, per prospektado, la rezervokvantojn de 132 specoj de mineraloj. Ĉinio lokiĝas inter la unuaj riĉaj posedantoj de mineraloj de volfra-

mo, stano, molibdeno, antimono, hidrargo, plumbo, zinko, fero, karbono, sulfuro, fosforo, asbesto, grafito, fluorito kaj magnezito, kaj okupas gravan lokon inter la mondaj posedantoj de prospektoritaj mineralaj riĉfontoj de kupro, aluminio, mangano, boro, roksalo, talko kaj kaolino.

NOVAJ FILMOJ FARITAJ DE ĈINIO

Por celebri la 30-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la Kultura Ministerio de Ĉinio emisiis nombron da novaj filmoj por projekcii en urboj kaj vilaĝoj tra la tuta lando. La prezentitaj 25 novaj filmoj inkluzivas 12 rakontajn kaj teatrajn filmojn kaj 13 belartajn, dokumentajn kaj scienco-edukajn filmojn. Ankoraŭ estos emisiitaj aliaj nombroj da novaj filmoj respektive en la Novjara Tago kaj la Printempa Festo de 1980.

Huangpu-haveno de Guangzhou (Kantono)



Aparte menciindaj estas jenaj rakontaj filmoj: "Sklavo — Generalo" en biografia formo, kiu priskribas tragedian kaj heroan vivon de iu generalo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, "Heroino Aolei Yilan", kiu konigas historian okazintaĵon antaŭ 300 jaroj kaj pri-kantas la patriotismon de nacimulplimulto de nordorienta Ĉinio montritan en rezistado kontraŭ agreso de eksterlandaj malamiko, "Hurlu, Huanghe-rivero!" kaj "Vibraĵoj de Vivo" ambaŭ kun



multaj muzikaĵoj, kiuj esprimas amon kaj karmemoron de la ĉina popolo al ĉefministro Zhou Enlai (Ĝou Enlaj), "Xiaohua", kiu prenas la Liberigan Militon kiel sian fonon kaj vive priskribas tragedian kaj ĝojan travivaĵon de tri gefratoj, kaj "Du Ĝemeloj kaj Du Ĝemelinoj", kiu estas komedia kaj plena de intensa vivetoso.

CINIO KAJ USONO KUNE FAROS RAKONTAN FILMON "MIRINDA MONGOLA ĈEVALO"

Tio estos la unua kunlaboro inter Ĉinio kaj Usono en faro de filmo. La filmo estas adaptaĵo de dramo de angla verkistino Han Suyin kaj estos ekfarita en printempo de 1980.

La filmo priskribas aventuron de mongola ĉevalo, kiu faris mortan batalon por libero. En la filmon estas metita epizodo de amo inter Wales-a knabino kaj filo de mongola paŝtisto.

La filmado plenumiĝos en Ĉinio, Britio, Francio, Jugoslavio kaj iuj lokoj de la Centra Azio. Filmludos geaktoroj de Ĉinio, Britio kaj Usono.

APREZA KUNVENO DE FREMD- LANDAJ POEMOJ KAJ KANTOJ

En la lasta septembro la redakcio de la gazeto "Poezio" okazigis

poezi-aprezan kunvenon kun granda sukceso.

La redakcio invitis ĉinajn famkonatajn geaktorojn kaj gekantistojn por deklami kaj kanti multajn famajn fremdlandajn verkaĵojn, inter kiuj troviĝis "Lastaj Vortoj" de franca verkisto V. M. Hugo, "Al la Nacio" de hungara poeto Sandor Petofi, "Deklaro" de germana poeto H. Heine, la japana kanto "Poŝta Kaleŝo" kaj kanto el la usona filmo "Sono de Muziko".

Germano Uwe Krauter kaj skotlandano Patricia Wilson, kiuj laboras en Ĉinio, kune kun ĉina dramistino kaj filmaktorino Huang Zongying deklamis kaj kantis la kanton de skotlanda poeto Robert Burns "Pasintaj Tagoj". Ilia pre-

zentado ricevis varman aplaudadon.


EKSPOZICIO DE FOTOJ PRI ĈINIO EN PARIZO

Por celebri la 30-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko okazis en Parizo, en la daŭro de septembro — novembro, la ekspozicio "Ekrigardo al Ĉinio", kiu prezentas al la vizitantoj, per 105 fotoj, ĉiutagan vivon kaj ŝanĝigon de Ĉinio.

Dum la eksponado okazis diskutoj pri la literatura kaj arta vivo, nacimalplimulto, filmoj, higieno, eduko kaj ekonomio de Ĉinio, kaj krome projekciigis rakontaj kaj dokumentaj filmoj pri Ĉinio.

Uwe Krauter (maldekstre), Patricia Wilson (meze) kaj Huang Zongying deklamas poemon.





Rakonto pri okulgloboj

de ZHU MINZHI

VESPERE de la 14-a de aŭgusto, 1979, en la brile iluminita Ĉefurba Sporthalo de Beijing regis gajeco. Tie okazis ceremonio, en kiu la Sri-lankaa ĉefministro Ranasinghe Premadasa donacis, en la nomo de la infanoj de Sri-lankao, elefanteton al la ĉinaj infanoj. Kaj en tiu gaja kunveno ĉefministro Premadasa intervidiĝis kun kvar ĉinaj amikoj aparte invititaj: ses-jara knabo Bai Jun, dek-jara knabino Zhang Yan, 25-jara desegnisto Sun Hongwei kaj 32-jara fervojisto Bai Changjiu. Ili suferis gravan kornean malsanon, iuj el ili eĉ blindiĝis, sed iliaj okuloj resaniĝis dank' al kuraco per okulgloboj senditaj de Sri-lankaa amiko.

Ĉefministro Premadasa tre ĝojis pro la intervidiĝo kun la kvar ĉinaj geamikoj. Li prenis manojn de Bai Jun kaj Zhang Yan, karesis al ili la vangojn kaj etendinte siajn fingrojn antaŭ iliajn vizaĝojn demandis, ĉu ili povas klare vidi. La geknaboj kun rideto nombris la fingrojn. La amikeca sceno vekis ĉe la ĉeestantoj gajajn ridojn. Kaj vic-ĉefministro Li Xiannian laŭdis la sukcesan kuracadon.

La vidkapabloj de Bai Jun kaj Zhang Yan malboniĝis pro denaska kornea tumor. Post fortranĉo de la tumor kaj enplanto de korneo

de okulgloboj de Sri-lankao iliaj vidkapabloj jam leviĝis evidente kaj tiu de Zhang Yan jam atingis 1.5. La desegnisto Sun Hongwei de la Fera-Ŝtala Fabriko de Xi'an preskaŭ ne povis vidi fingrojn tuj antaŭ la okuloj pro suferado de herpeta keratito, sed post penetra enplanto de korneo de okulgloboj de Sri-lankao li denove posedas klarvidajn okulojn. Dum la intervidiĝo li prezentis al ĉefministro Premadasa poemon kun la titolo "Kanto pri Amikeco Revidiga".

Estas kortuŝa historio pri amikeco en kuracado de ĉinaj blinduloj per okulgloboj de Sri-lankao.

En la 8-a de novembro, 1978, Zhang Xiaolou, estro de la hospitalo Tongren de Beijing, ricevis varman leteron de doktoro Hudson Silva, prezidanto de la Okulglobolivera Asocio de Sri-lankao. Ĉar doktoro Silva informiĝis de usona doktoro, kiu vizitis Ĉinion, ke al Ĉinio mankis okulgloboj por fari al iuj blinduloj kornean transplanton. Li esprimis en la letero ke li volonte liveros senpage al la nomita hospitalo kelke da okulgloboj. Li skribis: "Tio estas simbolo de amikeco inter niaj landoj."

Silva estas fame konata okulisto de oftalma hospitalo de Kolombo. En 1957 li jam komencis entrepreni

korneotransplanton. El la pacientoj iuj perdis sian vidkapablon pro nenormalaĵo aŭ lezo de korneo, aliaj blindiĝis pro karencio en infaneco kiu kaŭzis kornean maldiafanecon. Dum la operacio de korneo oni devas elpreni la malsanan korneon kaj enplanti sanan. Sana korneo estas akirebla de homo maksimume je ses horoj post lia morto kaj devas esti fride konservita en speciala likvaĵo. Por akiri sanan korneon doktoro Silva alvokis al ĉiuj popolanoj de Sri-lankao ke ili oferu siajn okulglobojn post la morto. Lia alvoko rikoltis varman respondon. En 1961 li iniciate starigis Okulgloboliveran Asocion de Sri-lankao kaj en 1965 li fondis la internacian okulglobokonservejon de Srilankao. Ĝis nun tiu asocio jam liveris pli ol 5,000 okulglobojn al ĉ. 40 landoj kaj dank' al tio multaj blinduloj denove povas vidi. Beijing estas la 80-a urbo al kiu la asocio liveris okulglobojn.

Tagmeze kaj vespere de la 17-a de majo, ĉijare, naŭ okulgloboj estis senditaj de Sri-lankao al la hospitalo Tongren de Beijing, Ĉinio. Tiuj okulgloboj plejparte elprenitaj en 1.5 horoj post la morto de la posedintoj estis tre bone konservitaj. Timante ke longa flugado de la aviadilo malbonigos la 9 okulglobojn, Silva speciale telegrafis al iu japana amiko en Tokio, ke li iru al la aerodromo por doni freŝan glacieron al la okulgloboj dum haltado de la aviadilo en Tokio. La varma koro de la Sri-lankaa amiko profunde emociis la kuracistojn kaj flegistinojn de la hospitalo. Post tagmeze kaj vespere de la sama tago kiam tiuj okulgloboj atingis la hospitalon, ili sukcese faris operacion de kornea transplantado al du pacientoj. Estas unuafoje por nia lando kuraci blindulojn per korneo de fremdlandanoj kaj tio enskribis amikecan paĝon en la oftalmologia

historio de Ĉinio. La hospitalo Tongren glate faris al ses pacientoj operacion de kornea transplantato per la naŭ okulgloboj.



Kiam ĉefministro Premadasa in-

tervidiĝis kun la kvar ĉinaj kuracitoj, la estro de la nomita hospitalo Zhang Xiaolou donis al ĉefministro Premadasa albumon kun fotoj de la ses kuracitoj antaŭ kaj post la ope-

racio. Sur la unua paĝo de la albumo estas skribitaj jenaj koraj vortoj de la ses kuracitoj kaj ĉinaj medicinaj laborantoj "Vivu la Amikeco inter Ĉinio kaj Sri-lankao".



Zhang Yan antaŭ la operacio



Zhang Yan post la operacio



LUO CAO:

ANTIKA BIBLIOTEKO TIANYIGE

OKCIDENTE de Yuehu-lago en la urbo Ningbo de Zhejiang-provinco apud la Orienta Ĉina Maro sin trovas majesta kvietaj etaĝdomo, nome Tianyige — unu el la famaj ĉinaj antikvaj bibliotekoj.

Tiu malnova biblioteko fondiĝis en la jaro 1561. Ĝia mastro estis Fan Qin, ŝtatoficisto de Ming-dinastio. La nomita sinjoro tre ŝatis legi, kopii kaj konservi librojn. Kiam li forpasis en sia 80-jara aĝo, la biblioteko jam enhavis pli ol 70,000 librojn. En tiu tempo kaj dum la sekvantaj ĉ. 400 jaroj, tiu biblioteko restis la plej riĉenhava en nia lando. En tiu biblioteko nun ankoraŭ konserviĝas multaj raraj lignogravure presitaj kopioj de la dinastioj Song kaj Yuan (de la X-a ĝis la XIV-a jarcento) kaj pli ol 270 lokaj

kronikoj de Ming-dinastio (1368—1644 p.K.). Tiuj materialoj estas tre valoraj por studo pri la ĉina historio.

Cirkulas kortuŝa anekdoto pri la libroamanto Fan Qin. Timante, ke la kolektitaj libroj perdiĝos, li dividis siajn posedaĵojn en du partojn antaŭ sia morto kaj lasis siajn du filojn fari elekton. Unu parto estis la domo Tianyige kun la konservataj libroj en ĝi, kaj la alia estis dekmil taeloj da arĝento. Lia pli aĝa filo Fan Dachong heredis Tianyige kaj la librojn. Fan Qin ordonis siajn posteulojn, ke ili ĉiam observu lian testamenton: “Neniam dividu la librojn kaj neniam elprenu librojn el la domo!”

La deziro de Fan Qin ja estis laŭdinda, tamen la biblioteko suferis tre grandan perdon en la jaroj sub la regado de feŭdaj imperiestroj kaj agresado de imperiistoj.

En la jaro 1776, la imperiestro Qianlong de Qing-dinastio ordonis, ke oni elektu pli ol 600 librojn el la biblioteko Tianyige por kompili la bibliotekon Si Ku Quan Shu (Kvarfaka Biblioteko). Kvankam la dekreto de la imperiestro promesis, ke la pruntitaj libroj estos redonitaj post uzado, tamen plejparto de ili estis alpropr-

gita de ŝtataj oficistoj. Dum la Opia Milito meze de la 19-a jarcento, brita agresa armeo invadis la urbon Ningbo, sin trudis en Tianyige kaj forrabis dekojn da serioj da valoraj libroj pri geografio kaj moroj de Ĉinio. Pli poste, iuj reakciaj librokomercistoj multfoje forŝtelis, en koluzio kun ŝtelistoj, valorajn librojn el la biblioteko. Antaŭvespere de la Liberiĝo, Tianyige jam fariĝis tre kaduka, falis la artefarita monteto en la korto kaj multaj el ĝiaj libroj perdiĝis aŭ difektiĝis de librovermoj kaj akvo.

Antaŭvespere de la liberigo de la urbo Ningbo, kamarado Zhou Enlai donis apartan ordonon, ke la Ĉina Popola Liberiga Armeo atente protektu la bibliotekon Tianyige. Post la Liberiĝo, la popola registaro starigis apartan organizon por ordigi kaj savi ĝiajn librojn kaj plurfoje riparigis la domon. Samtempe kun tio, pli ol 3,000 disportitaj libroj de tiu biblioteko estis rekolektitaj, kaj iuj libroamantoj meminitate donacis al ĝi valorajn antikvajn librojn konservatajn de ili. La nombro de ĝiaj libroj estis 21,000 je la Liberiĝo, dum nun ĝi jam atingis ĉ. 300,000. Kaj krome, nova domo por konservado de libroj konstruiĝis kontraŭe al la antikva. Hodiaŭ Tianyige jam fariĝis vizitinda loko en Ningbo por la turistoj.

La domo de Tianyige



Parto de la biblioteko







Insulo de Birdoj


En Qinghai-lago sur la nordokcidenta altebenaĵo de Ĉinio kuŝas bela Insulo de Birdoj, kiu altas nur je dekkelkaj metroj super la akvo. Tie dense loĝas birdoj, inter kiuj troviĝas nigra- kaj brun-kapaj mevoj, makul-kapaj sovaĝanseroj kaj pandionoj. Nun la makul-kapaj sovaĝanseroj, kiel unu el la altebenaĵaj birdspecoj, kiuj pli kaj pli malmultiĝas en la mondo, estas protektataj.

Kiam oni atingas la insulon, oni vidas, ke la pandionoj flugas super la lago, la timemaj makul-kapaj sovaĝanseroj konfuzite rapidas foren, kaj la nigra-kapaj mevinoj, kiuj kovas sian idon, iom ektimas, tamen la virmevoj ilin gardas kontraŭ eventuala atako. La plej malgrandaj brun-kapaj mevoj estas ferocaj, kaj la virmevoj ĉiuj estas elstaraj batalistoj kaj kelktempe amase leviĝas por rezisti kontraŭ nizoj, ke la lastaj nenion akiras kaj forflugas deprimate.

La fotoj aperintaj ĉi tie estis faritaj de Xin Yingyi, kiam li ekskursis al la birdo-insulo. Rigardu, kiel alloga ĝi estas!







FOTOJ PRI NATU- RAJ BELAĴOJ FA- RITAJ DE E-ISTOJ

Sulfurflava ane-
mono sur la Alpoj

de Otto Böhm
(FR Germanio)



Finnlando estas konata kiel lando de milo da lagoj. Jen apud unu el ili, Kallavesi, okazis en somero 1979, komence de julio, infana kaj junula Esperanto-kurso, de maldekstre: Anna-Mari, Ulla, Virva, Sirkku, Ilari, Essi, instruistino Maila kaj Jukka.

de nia finnlanda
peranto **J. Jäntti**





Rapida sketado

Mezlernejaninoj en arta sketado



Amatoroj-skiantoj





Vintraj Sportoj en Jilin

Urbo Jilin troviĝas en Jilin-provinco de nordorienta Ĉinio. Vintre neĝo kovras la teron. Tie preskaŭ ĉiuj loĝantoj ŝatas sportojn sur glacio.

Satata ludo de infanoj





Metiartaĵoj “Qiuse” kaj Papertranĉaĵoj de Foshan

“Qiuse” kaj papertranĉaĵoj de Foshan en Guangdong-provinco estas popularaj metiartaĵoj kun originala stilo.

La metiartaĵoj “Qiuse” inkluzivas diverskolorajn lanternojn kaj homfigurojn, birdojn, bestojn, florojn, fruktojn k.a. faritajn el papero, tolo, vakso aŭ argilo. Ili estas vivecaj en plastiko.

La papertranĉaĵoj de Foshan estas de multaj specoj. Ili estas brilkoloraj kaj karakteriziĝas per vasteco de enhavo. Iuj el ili estas kun fortaj strekoj, kaj aliaj estas delikataj. Ili servas kiel dekoraĵoj.

“Feino Chang-e Flugas al la Luno” el ĉina mito

Leono



Kamelo







Post laboro




Knabino en brokado



Pavo



Feniksa paro



Tibetana kuracistino

8152

